


KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 375 (núm. 7 de la 6a època) JUNY / JUNIO 2024

MARO ESTAS GUTARO



**Internacia komunikado
kaj plurlingvismo
en la mezepoko**

**Comunicació internacional
i multilingüisme
a l'edat mitjana**

SALUTOJ	
➤ Prezidanta kaj redaktora salutoj	3
INTERNACIA KOMUNIKADO KAJ PLURLINGVISMO EN LA MEZEPOKO COMUNICACIÓ INTERNACIONAL I MULTILINGÜISME A L'EDAT MITJANA	
➤ Llengua y identitat política al reino d'Aragón	4
➤ Lingvo kaj politika identeco en la Reĝlando de Aragono.....	5
➤ Lingvoj en rilatoj inter romianoj kaj persoj	9
➤ Què ens poden explicar els diplomes medievals sobre la llengua de Catalunya?	12
➤ Les llengües de la diplomàcia i de les relacions internacionals a la Corona d'Aragó.....	15
➤ Un mar de llengües: la comunicació i traducció lingüística oral i escrita entre cristians i musulmans a la Mediterrània tardo-medieval	18
➤ L'esclavitud, un factor d'enriquiment de la diversitat lingüística a les ciutats costaneres baixmedievals	22
LITERATURO - LITERATURA	
➤ Virinoj en romanoj de virinoj	26
➤ Tempogardistoj: originala rolludo lanĉita dum la RenKEJtiĝo	29
➤ Esperanto kaj la Literaturaj Premioj Grau Miró.....	31
➤ Poezia angulo. Ausias March, amkanto 29	32
HISTORIO/MEMORO - HISTÒRIA/MEMÒRIA	
➤ La Esperanta Tarragonprovinca Ligo	33
➤ Canvi en el consell de redacció de <i>Kataluna Esperantisto</i> en temps de dictadura.....	36
LINGVOJ - LENGÜES	
➤ Batalo de gigantoj: kian multlingvismon ni deziras?.....	37
➤ Despertar asturià?	39
ENTREVISTA	
➤ Òscar Puig: «L'esperanto podria democratitzar la comunicació global, assegurant que cap llengua domini sobre les altres»	41
ANGULO POR KOMENCANTOJ	
➤ Krucvortenigmo: profesioj.....	44
NIA AGADO – LES NOSTRES ENTITATS	
➤ Activitat recent de KEA: una temporada plena d'esdeveniments.....	45
➤ Kataluno ricevis la premion Grabowski.....	47
➤ Lasta agado de KEJ.....	50
VILAGŬO ESPERANTO	
➤ Mangájo.....	51

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

revuo-ke@esperanto.cat

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
Apartat 1008 - 08204 Sabadell
Papa Pius XI, 130 - 08208 Sabadell
www.esperanto.cat
info@esperanto.cat

Consell de redacció: Pere Fornells,
Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Xavier Margais,
Pedro M. Martín Burutxaga, Òscar Puig,
Alfons Tur, Carles Vela, Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Siru Laine,
Pedro M. Martín Burutxaga (esperanto),
Anna Maria Muñoz Morata (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO
KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

President/Prezidanto: Alfons Tur,
Vicepresidenta /Vicprezidanto: Sandra Vives,
Secretària/Sekretario: Maria Sánchez,
Tresorera/Kasisto: Clara Casanovas,
Vocals/Voĉdonantoj: Jordi Aguilar,
Mon Cardona, Albert Claret, Lluís de Gibert,
Antoni Gimeno, Òscar Hernández, Siru Laine,
Ferriol Macip, Enric Pineda, Sebastià Ribes,
Sílvia Soler, Carles Vela, Representan de KEJ/
Reprezentanto de KEJ: Òscar Hernández.

JOVENTUT CATALANA D'ESPERANTO/
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO

President/Prezidanto: Òscar Hernández,
Vicepresident - Vicprezidanto: Joan Visa,
Tresorer/Kasisto: Jordi Calafí,
Secretari/Sekretario: Isaac Giménez,
Representant a TEJO/ Komitatano A en TEJO:
Lucia M. Fernández, Relacions exteriors/
Eksteraj rilatoj: Jaime Tapia.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA. Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L'opinió de KEA només s'expressa a través de l'editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència Creative Commons Reconeixement-NoComercial-SenseObraDerivada 2.5 (<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de reproduir-los i distribuir-los, sempre que es faci sense afany de lucre i se'n reconegui explícitament els autors, i l'Associació Catalana d'Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
08004 Barcelona

PREZIDANTA SALUTO



Alfons Tur

Benvolguts/des soci/es:

El proppasat mes de març a la darrera Assemblea General vaig rebre l'encàrrec de presidir KEA. Després de cinc anys de dedicació intensa l'Òscar Puig va demanar de deixar el càrrec que va entomar en un moment delicat, per això les meves primeres paraules són d'agraïment i de reconeixement de la tasca realitzada.

A banda del canvi de President, a la nova junta es mantenen tots els que ja hi eren i a més comptem amb la incorporació de la Siru Laine, en Jordi Aguilar i l'Albert Claret. Voldria destacar que amb els nous membres es rejoveneix la junta i es produeix l'entrada de persones que havien estat a KEJ. Aquesta evolució natural és molt gratificant, perquè implica una continuïtat generacional que és una garantia de futur per a l'esperantisme català.

Conscients de les nostres forces i de les nostres febleses volem mantenir tot allò que ja s'ha anat assolint, ampliar-ho i millorar-ho, però per això ens cal l'aportació de tothom: voldria animar a cadascú de vosaltres a implicar-vos i a col·laborar amb l'associació en la mida de les vostres possibilitats.

Sempre endavant! ■

Karaj gemembroj,

En la lasta ĝenerala asembleo, pasintmarte, mi estis elektita kiel la nova prezidanto de KEA. Post kvin jaroj de intensa laboro Óscar Puig petis la eksigon de la posteno kiun li entreprenis en delikata momento, tial miaj unuaj vortoj estas rekono kaj danko pro la farita tasko.

Krom la ŝanĝo de la Prezidanto, la ceteraj estraranoj restas, kaj ni eĉ pligrandigis la estraron, ĉar aldoniĝis Siru Laine, Jordi Aguilar kaj Albert Claret. Mi volus emfazi, ke tiuj novaj anoj signifas reunigon danke al la eniro de intaj KEJanoj. Tiu natura evoluo estas aparte ĝojiga, ĉar ĝi establas generacian kontinuecon kaj estas garantio por la estonteco de la kataluna esperanta movado.

Konsciaj pri niaj fortoj kaj malfortoj, ni celas konservi tion, kion ni jam atingis, kaj plivastigi kaj plibonigi ĝin. Por tion efektiviĝi ni bezonas la partoprenon de ĉiuj; tial mi volus instigi ĉiun el vi al engaĝiĝo kaj kunlaboro en la asocio laŭ sia ebleco.

Ĉiam antaŭen! ■

REDAKTORA SALUTO



Pere Fornells

Avui comparteixo aquesta pàgina amb el nostre nou president, que ens saluda després d'haver estat escollit a la darrera assemblea. Des d'aquí el felicitem i li desitgem molts encerts i èxits en aquesta etapa. Aquest 2024 és un any dens, amb un nou congrés i un nou renKEJtiĝo. Felicitem des d'aquí també el nostre jovent per la consolidació i la força de les seves activitats.

La comunicació internacional ha passat per molts reptes i canvis amb el pas del temps. Coses que podien semblar immutables ara són poca cosa més que un record o un àmbit d'estudi acadèmic. Us n'ofereim alguns exemples dels temps en què el llatí va anar retrocedint per deixar espai a altres llengües. Algunes de les més oblidades de la península Ibèrica tenen una presència especial en aquest número, cosa que ens fa feliços.

Amb l'esperanto no només volem oferir una eina de comunicació accessible i neutral per a tothom, sinó també una via per a un millor coneixement, estima i pau entre pobles. Sembla que en el nostre entorn geogràfic cada vegada més veus poderoses apunten cap a una direcció contrària. Com a esperantistes, i sense perdre de vista la gran complexitat de les societats dels nostres temps, no ens hi podem resignar. Com diu el nostre president, sempre endavant. Com sempre, moltes gràcies a tot l'equip i col·laboradors que han fet possible aquest *Kataluna Esperantisto*. Bona lectura! ■

Hodiaŭ mi dividas tiun ĉi paĝon kun nia nova prezidanto, kiu salutas nin post esti elektita en la lasta asembleo. Ni gratulas lin kaj lin deziras multajn sukcesojn kaj trafojn en tiu ĉi etapo. Tiu 2024 estas densa jaro, kun novaj kongreso kaj RenKEJtiĝo. Ni ankaŭ gratulas nian junularon pro konsolidado kaj vigeleco de sia movado.

Internacia komunikado trapasis multajn defiojn kaj ŝanĝojn tra la tempo. Ŝajne neŝanĝeblaj aferoj estas nuntempe apenaŭ memoraĵoj aŭ akademiaj fakoj. Ni montras kelkajn ekzemploj de kiam la latina retrocedis kaj lasis spacon al aliaj lingvoj. Kelkaj el la plej forgesataj de la Iberia duoninsulo ludas specialan rolon en tiu ĉi numero. Tio ĝojigas nin.

Pere de esperanto ni ne nur volas oferi alireblan kaj neŭtralan komunikilon por ĉiuj, sed ankaŭ helpilon por pli bonaj interkono, amo kaj paco inter popoloj. Bedaŭrinde en nia geografia ĉirkaŭaĵo pli kaj pli da povaj voĉoj indikas kontraŭan direkton. Kiel esperantistoj, konsciante pri la granda komplekseco de nuntempaj socioj, ni ne povas akcepti tion. Kiel diras nia prezidanto, ĉiam antaŭen. Kiel ĉiam, koran dankon al la tuta teamo kaj al kunlaborantoj, kiuj ebligis tiun ĉi *Katalunan Esperantiston*. Bonan legadon! ■

LLENGUA Y IDENTIDAD POLITICA AL REINO D'ARAGÓN

Guillermo Tomás Faci

Estudio de Filología Aragonesa

L'aragonés ye una llengua romanz ben chicorrana que charran bellas cinc mil personas a la vesant meridional del Pirineu central: fa un sieglo se feba servir per tot lo norte d'Aragón, pero hue només conserva bella vitalidat enta part de Ribagorza, y a las valls d'Echo y Chistau.¹ Ye un idioma amanau a l'extinción, y tasament reconeixeu per las institucions: encara que se considera una de las dos «llenguas propias» d'Aragón, el gobierno autonómico actual ni sisquiera las quere cllamar pels suyos noms historicos, aragonés y catalán.

La trista situación actual contrasta dan lo que pasaba a l'Edat Michá, quan l'aragonés –u, millor dito, els dialectos que el composaban– yera la llengua més charrada per tot lo reino d'Aragón, s'escribiba en tota mena de rechistros formals, y mismo teniba bell desarrollo literario.

L'aragonés, com todas las llenguas romances, deriva de l'evolución del llatín vulgar enta un *continuum* de dialectos, agon els més próximos siempre teniban prou afi-

nidat. Els que s'empllegaban drinto de las bogas d'Aragón en teniban molta, d'afinidat, a pesar de que tapoc yeran homochenias. Manimenos, l'elemento que els va cohesionar de traza més duradera va estar l'aparición d'una variant común, una llengua formal que tots asumiban com a propia y que va prenre el chentilicio del reino coma nom. Per tanto, el naixement de l'aragonés com a llengua autonoma teniba una relación estreta dan la construcción d'un Estau medieval, el reino d'Aragón, dan tot lo que aixó suposaba en materia de lleis, impuestos, aparato coercitivo, moneda, etc. Totas dos cosas van encomenzar t'allá ta'l sieglo XIII.

Sobre la cuestión del vinclo entre llengua y Estau a l'Aragón medieval ya n'he parlau ampllament en altra ocasion, conque ací me quero centrar en un afer concreto: el valor simbolico de la llengua en tanto que icono identitario d'una comunitat política. Dimpués veremos dan bell eixempllo ben acclaridor que fer servir una llengua a la comunicacón publica, a ve-gadas, podeba esdevindre un acto politico.²

Els reis d'Aragón y contes de Barcelona van estar, dende la unió dinastica de Ramón Berenguer y Petronila, els soberanos d'una monarquía compuesta, agon els territorios teniban la suya personalidat churidica y identitat politica, y tamé llenguas propias diferents. Els reis, per

1 Enta una visión cheneral sobre l'aragonés, se veiga: ÁNHEL CONTE CAZCARRO, CHORCHE CORTÉS, ANTONIO MARTÍNEZ RUIZ, FRANCHO NAGORE LAÍN y JESÚS VÁZQUEZ OBRADOR, *El Aragonés, identidad y problemática de una lengua*, Zaragoza, Librería General; JAVIER GIRALT LATORRE y FRANCHO NAGORE LAÍN (coords.), *Aragonés y catalán en la historia lingüística de Aragón*, Zaragoza, Universidad de Zaragoza, 2020; ESTUDIO DE FILOLOGÍA ARAGONESA, *Gramática básica de l'aragonés*, Zaragoza, Prensas de la Universidad de Zaragoza, 2021.

2 Guillermo TOMÁS FACI, *El aragonés medieval. Lengua y Estado en el reino de Aragón*. Zaragoza, Prensas de la Universidad de Zaragoza, 2020.



LINGVO KAJ POLITIKA IDENTECO EN LA REĜLANDO DE ARAGONO

Guillermo Tomás Faci
Aragona Filologia Eseo
Tradukis Eduardo Berdor



La aragona estas malgranda latinida lingvo parolata de ĉirkaŭ kvin mil homoj sur la suda flanko de la centraj Pireneoj: antaŭ jarcento ĝi estis uzata en la tuta nordo de Aragono, sed ĝi konservas nur iom da vigleco en parto de Ribagorza, kaj en la valoj de Echo kaj Chistau¹. Ĝi estas endanĝerigita lingvo, kaj ĝi estas apenaŭ agnoskita de la institucioj: kvankam ĝi estas konsiderata unu el la du “propraj lingvoj” de Aragono, kiujn la nuna aŭtonoma registaro ne volas nomi per siaj historiaj nomoj: aragona kaj kataluna.

La malĝoja nuna situacio kontrastas kun tio, kio okazis en la Mezepoko, kiam la aragona - aŭ pli ĝuste, la dialektoj kiuj konsistigis ĝin - estis la plej parolata lingvo en la tuta reĝlando de Aragono, ĝi estis skribita en ĉiaj formalaj registroj, kaj ĝi eĉ havis rimarkindan literaturan evoluon.

La aragona, kiel ĉiuj latinidaj lingvoj, devenas el la evoluo de la vulgara latina en komplekso da dialektoj, kaj la plej proksi-

maj ĉiam havis sufiĉe da afineco. Tiuj, kiuj troviĝis inter la landlimoj de Aragono, havis multe da afineco, malgraŭ tio, ke ili ne estis homogenaj. Tamen, la elemento kiu kunigis ilin en pli daŭra maniero estis la apero de komuna varianto, formala lingvo kiun ili ĉiuj surprenis kiel sian propran kaj kiu prenis la reĝlandan kiel sian nomon. Tial, la naskiĝo de la aragona kiel aŭtonoma lingvo havis proksiman rilaton al la konstruado de mezepoka Ŝtato, la Reĝlando de Aragono, kun ĉiuj ĝiaj sekvoj: leĝoj, impostoj, truda aparato, valuto, ktp. Ambaŭ aferoj komenciĝis jam en la 13a jarcento.

Pri la demando de la ligo inter lingvo kaj Mezepoka Aragono mi jam amplekse parolis en alia okazo, do ĉi tie mi volas koncentriĝi pri specifa afero: la simbola valoro de lingvo kiel identeca ikono de politika komunumo. Poste ni vidos belan kaj klerigan ekzemplon, ke uzi lingvon en publika komunikado, foje, povus fariĝi politika ago.²

La reĝoj de Aragono kaj grafoj de Barcelono estis, de la dinastia kuniĝo de Ramon Berenguer kaj Petronila, la suverenoj de kunmetita monarkio, ĉar la teritorioj havis sian propran politikan personecon kaj politikan identecon, kaj ankaŭ malsamajn lingvojn proprajn. La reĝoj, do, devis klopodi por konservi teritoriajn

1 Por ĝenerala vido pri la aragona lingvo, vidu: ÁNCHEL CONTE CAZCARRO, Chorche CORTÉS, ANTONIO MARTÍNEZ RUIZ, FRANCHO NAGORE LAÍN y JESÚS VÁZQUEZ OBRADOR, *El Aragonés, identidad y problemática de una lengua*, Zaragoza, Librería General; JAVIER GIRALT LATORRE y FRANCHO NAGORE LAÍN (coords.), *Aragonés y catalán en la historia lingüística de Aragón*, Zaragoza, Universidad de Zaragoza, 2020; ESTUDIO DE FILOLOGÍA ARAGONESA, *Gramática básica de l'aragonés*, Zaragoza, Prensas de la Universidad de Zaragoza, 2021.

2 Guillermo TOMÁS FACI, *El aragonés medieval. Lengua y Estado en el reino de Aragón*. Zaragoza, Prensas de la Universidad de Zaragoza, 2020.

tanto, heban de esforzar-se enta mantinre els equilibrios territorials, y la llengua yera una de las einas que els hu permitiba fer. Per un regular, la monarquía feba servir a la suya comunicación escrita –l'única que podem coneixer– el llatín, el catalán y l'aragonés, y, seguntes las suyas necesidats comunicativas y politicas, en preferiba uno u altro.

Las alteracions politicas que va partir el reino aragonés entre la fin del Doscientos y la mitat del Trescientos mos proporcionan casos pllaters: cuan el rei queriba estar autoritario y llontano dels suyos vasallos, els escribiba en llatín, la llengua de Dios y de l'imperio. Cuan el que queriba yera amostrar-se més proximo y empatico, asobén enta conseguir d'ells bella favor fiscal u militar, s'estimaba més d'escribir-les en el suyo romanz. Per eixempllo, Pedro el Gran, rei entre 1276 y 1286, y el fillo d'ell, Alfonso el Chusto, que va reinar dica 1291, van afrontar-se a una «unión» de las fuerzas sociales del reino: al encomenzamiento, Pedro va mirar de empatizar dan ells perque le caleba achuda militar enta aturar un exercito francés que va entrar per Navarra, y alavegada va encomenzar a escribir-les en aragonés (una cosa que nunca no s'heba fet antes); en 1287 Alfonso y la Unión van arribar a la guerra, y la correspondencia reyal va tornar al llatín; en 1288 el rei va haber de firmar un privilechio que suposaba la suya rendición y, de nuevas, se va fer en aragonés; dende 1290 l'autoridad del monarca se va restaurar, y el romanz va desapareixer per molto temps. Las decisiones lingüísticas dels reis, per tanto, no yeran arbitrarias y tapoc se basaban només en criterios comunicatius: permitiban fer politica.¹

Dende 1350 el contraste entre llatín y aragonés va perder relevancia –la unión aragonesa va ser vencida al campo de batalla en 1348–, de vegada que l'uso dels romances s'esteneva a la Royal Cancillería, ye dir, la institución que escribiba las cartas en nom

1 *Ibidem*, pp. 186-193.

”

Las autoridades de Girona en 1336 van recibir una carta de Pedro el Ceremonioso, y a la respuesta no se van estar de fer-le acordar que era escrita en aragonés, *del qual lengatges nós no som tam ben entenens com del cathalan*

”

Els rechistros tamé mostran que als llugars de la Francha –las comarcas catalanofonas d'Aragón– els escribiban mayorment en catalán

”

Més enta debant las cartas als llugars de la Francha van encomenzar a fer-se en aragonés, ye dir, per cada vegada el vinclo politico importaba més a l'hora de penre decisiones lingüísticas

del rei. Dende alavegada, la llengua va servir més que més enta marcar las identitats aragonesa, catalana y valenciana: el rei sabeba que heba d'escriure a cadaguno dan el romanz correspondient, y si no hu feba els vasallos podeban enrabiarse. Aixinas, las autoridades de Girona en 1336 van recibir una carta de Pedro el Ceremonioso, y a la respuesta no se van estar de fer-le acordar que *era escrita en aragonés, del qual lengatges nós no som tam ben entenens com del cathalan*; s'ha de dir tamé que alavegada la sociedad politica catalana yera preocupada pel predominio aragonés a la cort, y aixó mos dona el contexto preciso d'aquella reacció.² Per un regular, las cartas reyalas s'escribiban en la llengua que tocaba, y els escribanos asobén hu anotaban als rechistros agon las copiaban. Per eixempllo, en 1420 Alfonso el Magnanimo va enviar a las autoridades de Barcelona una carta enta recontar-les els suyos progresos militares a Corcega, y els escribanos van anotar, dichós de la copia de rechistro, que se'n van fer set d'iguales enta altras ciudats catalanas y valencianas, y dos més *sub similibus data, signo atque mandato in diamate aragonensi* ('dichós de la misma data, signo y manament en idioma aragonés') destinadas a la Diputación d'Aragón y el concello de Zaragoza.³

Els rechistros tamé mostran que als llugars de la Francha –las comarcas catalanofonas d'Aragón– els escribiban mayorment en catalán. En 1404 la reina María de Luna va escriure a una trentena de llugars y vilas d'Aragón una carta en aragonés enta demanar-les una achuda economica, pero se va acllarir que la que anaba a Fraga yera traducida *in vulgari catalano*. Manimenos, més enta debant las cartas als llugars de la Francha van encomenzar a fer-se en aragonés, ye dir, per cada vegada el vinclo

2 Josep PERARNAU ESPELT, «Els jurats de Girona indiquen al rei que els escrigui en català (1336)», *Revista de Girona*, 104 (1983), pp. 233-236.

3 Archivo de la Corona de Aragón (ACA), Cancillería, rech. 2671, ff. 103r-104v

ekvilibrojn, kaj lingvo estis unu el la iloj kiuj permesis al ili fari tion. Kutime la monarkio uzis en sia skriba komunikado – la sola kiun ni konas – la latinan, la katalunan kaj la aragonan kaj, laŭ siaj komunikaj kaj politikaj bezonoj, ĝi preferis unu aŭ la alian.

La politikaj ŝanĝoj, kiujn suferis la aragona reĝlando inter la fino de la 13a jarcento kaj la mezo de la 14a jarcento provizas al ni evidentajn kazojn: kiam la reĝo volis esti aŭtoritatema kaj malproksima de siaj vasaloj, li skribis al ili en la latina lingvo: la lingvo de Dio kaj de la imperio. Kiam tio, kion li volis, estis aperi pli proksima kaj empatia, por ricevi de ili iun fiskan aŭ militan favoron, li preferis skribi al ili en ilia latinida. Ekzemple, Petro la Granda, reĝo inter 1276 kaj 1286, kaj lia filo, Alfonso la Justa, kiu reĝis en 1291, alfrontis “unuiĝon” de la sociaj fortoj de la regno: komence, Petro provis amikiĝi kun ili ĉar la militistoj klopodis haltigi francan armeon, kiu eniris Navaron, kaj tiam li komencis skribi al ili en la aragona (io, kio neniam antaŭe venis en lian kapon); en 1287 Alfonso kaj la Unuiĝo ek militis unu kontraŭ la alia, kaj reĝa korespondado revenis al la latina; en 1288 la reĝo devis subskribi privilegion kiu signifis lian kapitulacion kaj, kompreneble, ĝi estis farita en la aragona; de 1290 la aŭtoritato de la monarko estis restarigita, kaj la latinida malaperis dum longa tempo. La lingvaj decidoj de la reĝoj do ne estis arbitraj kaj ne baziĝis nur je komunikaj kriterioj: ili ebligis fari politikon.³

La Aragona Unuiĝo estis venkita en la batalkampo en 1348 kaj ekde 1350 la kontrasto inter la latina kaj la aragona perdis gravecon. La uzo de la latinidaj lingvoj etendiĝis al la Reĝa Kancelierejo, tio estas, la institucio kiu skribis la leterojn nome de la reĝo. Ekde tiam, la lingvo servis pli ol ĉio por substreki la aragonan, katalunan kaj valencian identecojn: la reĝo sciis, ke li devas skribi al ĉiu en la respektiva latinida lingvo, kaj se li

”
La aŭtoritatoj de Ĝirono en 1336 ricevis leteron de Petro la Ceremonia, kaj en sia respondo ili memorigis lin pri tio ke “ĝi estas skribita en la aragona, lingvon kiun ni ne komprenas same bone kiel la katalunan”

”
La registroj ankaŭ montras, ke en lokoj en la Strio (la katalunlingva parto de nuna Aragono) oni skribis plejparte en la kataluna

”
Iom post iom la leterojn al la lokoj de la Strio oni skribis en la aragona, tio estas, ĉar ĉiufoje la politika ligo pli gravis kiam oni prenis lingvajn decidojn

ne faros, la vasaloj povus koleri. Tiel, la aŭtoritatoj de Ĝirono en 1336 ricevis leteron de Petro la Ceremonia, kaj en sia respondo ili memorigis lin pri tio ke “*ĝi estas skribita en la aragona, lingvon kiun ni ne komprenas same bone kiel la katalunan*”; oni devas diri ankaŭ, ke tiutempe la kataluna politika socio zorgis pri la aragona superregado ĉe la kortego, kaj tio donas al ni la precizan kuntekston de tiu reago⁴. Kutime, reĝaj leteroj estis skribitaj en la koncerna lingvo, kaj la skribistoj notis ilin en la registroj antaŭ ol ili estis kopiitaj. Ekzemple, en 1420 Alfonso la Grandanima sendis leteron al la aŭtoritatoj en Barcelono rakontante al ili pri lia milita progreso en Korsiko, kaj la skribistoj notis, sub la kopio de la registro, ke oni faris po unu kopio por sep katalunaj kaj valenciaj urboj, kaj du pliajn *sub similibus data, signo atque mandato in diamate aragonensi* (‘sub la sama dato, signo kaj komando en la aragona lingvo’) destinitaj al la Deputitejo de Aragono kaj la konsilio de Zaragozo.⁵

La registroj ankaŭ montras, ke en lokoj en la Strio (*Franja* - la katalunlingva parto de nuna Aragono-) oni skribis plejparte en la kataluna. En 1404, reĝino María de Luna skribis leteron en la aragona al ĉirkaŭ tridek lokoj kaj urboj en Aragono petante al ili ekonomian helpon, sed montriĝis ke tiu iranta al Fraga estis tradukita *in vulgari cathalano*. Tamen, iom post iom la leterojn al la lokoj de la Strio oni skribis en la aragona, tio estas, ĉar ĉiufoje la politika ligo pli gravis kiam oni prenis lingvajn decidojn; estas kuriozaj kelkaj leteroj senditaj en 1429 inter Maella, Fabara kaj Calaceite, pri kiuj estas dirite ke *fuertunt expedite in linga aragonensi* (‘ili estis senditaj en la aragona lingvo’), sed *per inadvertenciam fuerint in linga catalana registratas* (‘pro preteraten-to ili estis registritaj en la kataluna

4 Josep PERARNAU ESPELT, «Els jurats de Girona indiquen al rei que els escrigui en català (1336)», *Revista de Girona*, 104 (1983), pp. 233-236.

5 Archivo de la Corona de Aragón (ACA), Cancillería, rech. 2671, ff. 103r-104v

3 *Ibidem*, pp. 186-193.

politico importaba més a l'hora de penre decisions lingüísticas; ye curioso el caso d'unas cartas enviadas en 1429 enta Maella, Fabara y Calaceite, de las cuales se diu que *fuertunt expedite in lingua aragonensi* ('se van expedir en llengua aragonesa'), pero *per inadvertenciam fuerint in lingua cathalana registratas* ('per inadvertencia se van rechistrar en llengua catalana'): regular que l'escribano encara pensaba que s'heban de fer en catalán.⁴

L'ámbito comunicatiu agon els usos lingüísticos van adquirir més protagonismo son las reuniones de las Cortes Chenerals de la Corona d'Aragón, las cuales achuntaban de cabo cuan a la ciudat de Monzón al rey dan els representants de Catalunya, Valencia y Aragón.⁵ Astí no i heba cap probllema comunicatiu: tots charraban en la suya llengua y enteneban la dels altres, seguntes mos hu deixan vere els llibres d'actas que s'i redactaban. El probllema yera la llengua del rei, perque d'ella se podeda deducir bella predilección per uns u altres, y aixó teniba implicacions als equilibrios politicos y territorials que constituiban l'alacet de la Corona d'Aragón dende la suya creación. En 1383 el idioma de la «proposición» (el discurso inaugural del monarca) va causar controversia entre els representants dels territorios, que se va solucionar dan el compromiso que el monarca parllaría en catalán, pero la respuesta que s'heba de fer en nom de tots se faría en aragonés; en reuniones posteriors el debat se va repetir, conque pareix que els aragonesos seguiban demanand que el rei fese servir la suya llengua. Els ecos d'isto debat tan peculiar van arribar lluent, dica una obra de la literatura universal como son las Cartas Persas de Montesquieu, agon el posan com eixempllo de las barallas sobre cuestiones irrelevantes a las cuales dedicaban el temps els intelectuales.

En otras Cortes Chenerals en Monzón, las de 1388-1399, el aragonesos van fer una protesta pel fet de que se queriban aprobar unas ordinacions sobre la administración de chusticia que només yeran en catalán.⁶ Astí demanaban que, com que l'aragonés no yera una llengua pior (*en aquella e en esta no oviessse una paravla más ne menos, ne oviesssen alguna differencia sino en la lengua*) y, amés amés, l'enteneban millor que el catalán, caleba que se fese *oblitera* ('traducción') *en lengua aragonesa*. Igual que dibam ante dan el caso de Girona, tot fa pensar que no yera només un probllema de comprensión: defender y fer servir la llengua propia yera un acto d'affirmación politica. ■

4 *Ibidem*, rech. 2351, ff. 21r-21v; rech. 2677, f. 99v.

5 Sobre ixa cuestión, se veiga: Juan-José SEGURA MALAGÓN y Guillermo TOMÁS FACI, «Conciencia y reivindicación lingüística en el Aragón medieval: el caso de las Cortes de Aragón de 1382-1384», *Alazet* 20 (2008), pp. 275-289.

6 José Ángel SESMA MUÑOZ, *Acta Curiarum Regni Aragonum. Tomo V: Cortes de Zaragoza 1381. Cortes Generales de Monzón, Tamarite de Litera y Fraga 1383-1384. Cortes Generales de Monzón 1388-1389*, Zaragoza, Grupo CEMA, 2009, pp. 326-369.

lingvo'): eble la notario ankoraŭ opiniis, ke ili devas esti faritaj en la kataluna.⁶

La komunika sfero kie lingvaj uzokutimoj akiris plej grandan rolon estas la kunvenoj de la Ĝeneralaj Korteso de la Kronlando de Aragono, kiuj okazis kelkfoje en Monzón inter la reĝo kaj la reprezentantoj de Katalunio, Valencio kaj Aragono.⁷ Tie ne estis komunikaj problemoj: ili ĉiuj parolis en sia propra lingvo kaj komprenis la aliajn, tiel kiel montras al ni la protokolo-libroj, kiuj estis verkitaj. La problemo estis la lingvo de la reĝo, ĉar el ĝi oni povis dedukti ian preferon por unu aŭ la alia, kaj tio havis implicojn por la politikaj kaj teritoriaj ekvilibroj, kiuj konsistigis la fundamenton de la Kronlando de Aragono ekde ĝia kreado. En 1383 la lingvo de la "Propono" (la inaŭgura parolado de la monarko) kaŭzis polemikon inter la reprezentantoj de la teritorioj, kiu estis solvita per la promeso ke la monarko parolos en la kataluna, sed la respondo kiu devis esti farita nome de ĉiuj estus farita en la aragona; en postaj kunvenoj ripetigis la debato, do ŝajnas, ke la aragonanoj daŭre petis, ke la reĝo uzu ilian lingvon. La eĥoj de tiu ĉi tre karakteriza debato forvojaĝis, ĝis verko de universala literaturo kiel la Persaj Leteroj de Montesquieu, kie li metas ĝin kiel ekzemplon de la kvereloj pri malgravaj aferoj, al kiuj la intelektuloj dediĉis sian tempon.

En aliaj Ĝeneralaj Korteso de Monzón, tiuj de 1388-1399, la aragonanoj protestis ĉar oni volis aprobi preskribojn pri la administrado de Justico kiuj estis nur en la kataluna.⁸ Do ili petis havi tradukon en la aragona lingvo, ĉar la aragona ne estas pli malbona lingvo (*en aquella e en esta no oviessse una paravla más ne menos, ne oviesssen alguna differencia sino en la lengua*, "en tiu kaj en ĉi tiu ne estos unu vorto pli aŭ malpli, oni ne rimarkos nenian diferencon krom en la lingvo") kaj, krome, ĉar ili komprenis ĝin pli bone ol la katalunan. Kiel ni antaŭe menciis en la kazo de Ĝirono, ĉio sugestas, ke ne temis nur pri problemo de kompreno: defendi kaj uzi la propran lingvon estis ago de politika firmigo. ■

6 *Ibidem*, rech. 2351, ff. 21r-21v; rech. 2677, f. 99v.

7 Pri tiu temo, vidu: Juan-José SEGURA MALAGÓN y Guillermo TOMÁS FACI, «Conciencia y reivindicación lingüística en el Aragón medieval: el caso de las Cortes de Aragón de 1382-1384», *Alazet* 20 (2008), pp. 275-289.

8 José Ángel SESMA MUÑOZ, *Acta Curiarum Regni Aragonum. Tomo V: Cortes de Zaragoza 1381. Cortes Generales de Monzón, Tamarite de Litera y Fraga 1383-1384. Cortes Generales de Monzón 1388-1389*, Zaragoza, Grupo CEMA, 2009, pp. 326-369.

Isto artiklo s'ha fetto drinto del prochetto El Estado dividido. Contestación, conflicto y revuelta social en la Corona de Aragón (PID2021-123286NB-C21), financiau pel Ministerio de Ciencia e Innovación, y s'integra en las llinias de treball del Grupo de Referencia CEMA (HR20_20R), financiau pel Gobierno de Aragón.


LINGVOJ EN RILATOJ INTER ROMIANOJ KAJ PERSOJ

Geoffrey Greatrex

Universitato de Otavo, Kanado



Se oni pensas pri lingvoj en kunteksto de diplomaciaj rilatoj inter (du) grandaj potencoj, oni eble supozus ke la afero relative simplas : bezoniĝas interpretistoj, evidente, kaj tradukistoj por la du koncernaj lingvoj. Tamen necesas jam je la komenco halti por konsideri la lingvojn koncernatajn. En la moderna mondo, kiam oni pensas pri rilatoj inter (ekzemple) Usono kaj Rusio, la lingvoj estas la angla (ne la usona) kaj la rusa. En la periodo, kiun oni nomas la Malfrua Antikveco (ĉirkaŭ 200-700 p.K.), ili estas la persa (pli precize, la mez-persa, t.e. nek la malnova de la tempo de Ciro kaj Dario, nek la moderna) kaj ... nu, jen tikla punkto! La romia imperio, ĝis sia tutfino en 1453 p.K., taksis sin tia, eĉ se modernuloj emas ĝin nomi 'bizanca'. En la Malfrua Antikveco (post 284), ekzistis (ĝis la disfalo de la okcidenta) du romiaj imperioj – okcidenta kaj orienta. En la orienta oni daŭre uzis kaj parolis la latinan, sed dum la sesa jarcento la helena (aŭ greka) anstataŭis la latinan tie. Tiel, ĝuste kiel la usonanoj uzas lingvon hereditan de aliaj, same faris la romianoj (orientaj) ; evidente, multaj enloĝantoj de la orienta romia imperio neniam ĉesis uzi la helenan lingvon dum la tuta antikva periodo.



En oficialaj diskutoj, ĉu je la landlimo – normale apud la urboj Nisibo kaj Dara, tie kie nun troviĝas limo inter Turkio kaj Sirio – ĉu en ĉefurboj Konstantinopolo kaj Ktesifono, oni scias, ke oni disponis interpretistojn kaj tradukistojn, kiuj kunlaboris, ekzemple, por pretigi traktatojn.

Pro la vastaj konkeroj de Aleksandro la Granda (kvara jarcento a.K.) la uzo de la helena lingvo etendiĝis ĝis Centra Azio. En la tria jarcento p.K., tuj post la transpreno de la imperio de la partoj, la persa reĝo Ŝapuro la unua (proks. 240-270 p.K.) invadis la romian imperion kaj venkis la romianojn plurfoje. Por fanfaroni siajn sukcesojn, li gravurigis **trilingvan** tekston sur kvadrata monumento apud la tombejoj de la aĥemenidaj reĝoj (Kserkso, Dario kaj aliaj), videblaj en la deklivo fone. Oni trovas fieran enskribadon pri liaj venkoj en la mez-persa, la parta kaj la helena : evidente, eĉ en suda Irano, oni supozis ke iuj povus daŭre legi la helenan (kaj imponiĝi de la atingadoj de la reĝo).

Ero el la Historio de Menandro la Protektisto pri la konkludo de pactraktato en 561 p.K.

Post kiam diskutiĝis ĉi tiuj punktoj kaj aliaj, oni skribis la kvindekjaran traktaton en la persa kaj la helenaj lingvoj; la helenan oni tradukis en la persan kaj la persan en la helenan. Konfirmis la interkonsenton por la romianoj Petro, la oficestro (posteno, kiun oni nomas en la latina *magister officiorum*), Eŭsebio kaj aliaj, por la persoj Ziĥo Jezdegusnaf kaj Sureno kaj aliaj. Kiam oni ambaŭflanke transigis la interkonsenton en kunmetitan version, oni atente komparis ilin (t.e. la du versiojn) laŭ la ekvivalenteco de la pensoj kaj la vortoj. *Sekvas la eroj de la traktato* (Menandro, fragmento 6.1, linioj 304-313 en la eldono de Roger Blockley, Liverpolo, 1985, mia traduko).

Prokopio rakontas kiel, en 538/539 p.K., la ostrogota reĝo Vitigis strebis estigi kontakton kun la persa reĝo Ĥusro por ke li ataku la romianojn, tiel ke tiuj lastaj devu militi samtempe dufrente

Intertempe Vitigis, la estro de la gotoj, jam venkita en la milito, sendis du ambasadorojn al Ĥusro por lin persvadi militi kontraŭ la romianoj. Tamen li sendis ne gotojn, por ke liaj planoj ne fiasku pro ilia tuja identigo, sed liguriajn sacerdotojn, kiujn oni instigis partopreni la aferon per malavaraj monsumoj. Tiu inter la du, kiu mienis pli noble, alprenis al si la aspekton kaj la titolon de episkopo, kiuj tamen neniel apartenis al li, kaj estris la ambasadon, dum la alia lin sekvis kiel servisto. Survoje tra la vilaĝoj de Trakio ili amikigis lokulon, por ke li estu por ili interpretisto de la helenaj kaj siriaj lingvoj. Ili atingis la persan teritorion nerimarkitaj de ĉiuj romianoj, ĉar pro la tiama paco ili ne zorge gardis la regionon. (*Persaj militoj*, ii.2.1-3, mia traduko)

Diplomatoj regule vojaĝis inter la regnestroj; estis kutimo, tuj sendi ambasadoron kiam surtroniĝis nova estro. En ambaŭ kortegoj do troviĝis kompetentuloj pri aliaj lingvoj por glatigi diplomatajn rilatojn. En la kazo de la persa lingvo, la romia historiisto Agatio (Agatias), kiu verkis ankaŭ poemojn kaj laŭkariere advokatis, konatiĝis kun romia interpretisto, Sergio laŭnome, kiu profitis siajn lingvajn sciojn por peti aliron al la persa reĝa arĥivo. Tie li esploris la historion de la persaj reĝoj (la t.n. sasanidoj, t.e. idoj de praulo Sasano, fondinto de la lasta reĝa dinastio antaŭ la islama konkero de Irano) kaj transdonis la informojn al la historiisto. Pro tio Agatio povis sufiĉe grandskale ekskursi en sia historia verko pri la pli frua historio de la persoj, eĉ se li profunde malaprobis iliajn nekristanismon kaj morojn. Notindas, ke lia versio de la dinastia historio ja similas tion, kion raportas postaj arabaj historiistoj, kiel al-Tabari (839-923 p.K.): fakuloj akceptas, ke li fidele raportis tion, kion transdonis al li Sergio surbaze de siaj esploroj.

Ambaŭ imperioj – romia kaj persa – vastis. En ili loĝis multaj popoloj, kiuj parolis diversajn lingvojn. En la norda limzono, ekzemple, loĝis (kaj loĝas) armenoj kaj kartveloj, kiuj ambaŭ konvertiĝis al kristanismo kaj poste adoptis alfabeton, parte por enradikigi la novan religion. Multaj armenoj prosperis en la romia imperio: oni trovas plurajn generalojn

kaj funkciulojn, kiuj devenas de Armenio, ekz. Narson (Nar-ses), eŭnukon sub Justiniano, kiu finkonkeris Italion en la 550aj jaroj.

La danĝero de manko de lingvo-scio

La historiisto Prokopio, kiu rakontas la militon en Italio, raportas la kapton de romia generalo nomita Gilakio, kiu, kiel Narso, venis de Armenio. Sed, laŭ Prokopio (*Militoj* 7.26.24-7), kiam la gotoj pridemandis lin pri li mem, li kapablis indiki nur lian nomon kaj rangon. Se oni fidus Prokopion (kiu eble troigas), nur tion povis komuniki la kompaktinda generalo, supozeble en la latina. Krom tio, li scipovis nek la helenan, nek la latinan, kvankam li estris en la romia armeo! Finfine la gotoj lin mortigis.

Pli sude, en la siriaj kaj mesopotamiaj steplandoj, multaj parolis la sirian lingvon (oni diras ‘Syriac’ en la angla, ‘syriaque’ en la franca), ŝemidan lingvon kiel la araban aŭ aramean, dum aliaj uzis la araban mem (kaj eĉ, en la sesa jarcento, komencis ĝin skribi laŭ la maniero, kiun oni nun konas). Interesan aludon al la graveco kaj utilo de la siria lingvo oni trovas en verko de elstara historiisto de la sesa jarcento, Prokopio de Cezareo.

Probablas, ke la siria lingvo permesis al la grupo komuniki ĉie inter Sirio kaj suba Mesopotamio, kie troviĝis la persa ĉefurbo Ktesifono, ĉar ĝi paroliĝis tra la tuta regiono, ambaŭflanke de la limo. La lingvon oni daŭre parolas kaj uzas hodiaŭ, ĉefe en eklezia kunteksto (por kelkaj kristanaj komunumoj, ekz. la ‘siriaj ortodoksuloj’, kiuj kondamnas la koncilion de Kalcedono en 451 p.K.). Cetere, dank’al ĝi konserviĝis pluraj helenaj sciencaj verkoj, kiujn oni tradukis unue en la sirian lingvon, poste en la araban – de kie ili poste atingis okcidenton.

En la imperia funkciularo troviĝis fakuloj pri eksterlandaj popoloj kaj lingvoj. Resumo de la rakonto de unu tia funkciulo, Nonoso (Nonnosus),



Bildo de la episkopo Maruto (maldekstre) en la Menologio de la imperiestro Bazilo la dua (kiu datiĝas de 985 p.K.). La verko proponas kalendaron, kiu indikas kiujn sanktulojn oni festu en kiu tago, kune kun taŭgaj bildoj. Oni ne certas pri kio precize bildiĝas ĉi tie.

transdoniĝis al ni per la katalogo de verkoj legitaj de la patriarĥo Fotio (naŭa jarcento p.K.), lia *Biblioteko*. Ĉi tie ni povas legi pri lia misio al la homeritoj (kiujn oni ankaŭ nomas 'himjaritoj', ili loĝis en la hodiaŭa Jemeno) kaj al la aksumitoj (en la hodiaŭa Etiopio) en la 530aj jaroj; li ankaŭ indikas, ke kaj lia patro kaj lia avo samrolis en misioj suden kaj orienten de la romia imperio. Evidente ĉi tiu familio spertis pri la regiono kaj pri rilatoj kun araboj kaj aliaj popoloj – kaj supozeble posedis taŭgajn lingvajn kompetentojn. Sed la romia ŝtato ankaŭ povis taski al aliaj personoj diplomatajn misiojn, tiel ekspluatante iliajn lingvokonojn. Belan ekzemplon konsistigas la episkopo Maruto de Majferkato (urbo, kiun oni ankaŭ nomis Martiropolo). Ĉi tiu armena princo, kies familio regis la distrikton Sofaneno (inter Mesopotamio kaj Armenio), rolis kiel ambasadoro al la persa kortego plurfoje, kaj eĉ sanigis la filon de la reĝo Jezdegerdo. Tiel estiĝis rimarkinde paca periodo inter la du potencoj, dum kiu ĉi tiu reĝo eĉ protektis la junan imperiestron Teodozio (la dua) kontraŭ eventualaj rivaloj. Sendube la fakto, ke ĉi tiu episkopo kaj kuracisto regis

plurajn lingvojn, inkl. la helenan, la armenan, kaj la sirian, permesis al li proksimiĝi al la reĝo kaj tiel plibonigi la statuson de la persaj kristanoj, al kiuj oni tiam (en 410) permesis starigi ilian propran eklezion, patronitan de la reĝo mem.

Konklude, lingvojn en la Malfrua Antikveco oni zorge atentis en internaciaj rilatoj. Kiel en la moderna mondo, iujn oni taksis pli gravaj ol aliaj – kaj ne nepre tiujn, kiujn oni pli vaste parolis. Imperioj ofte privilegiis sian propran lingvon, sed notindas ke la persa reĝo Ĥusro la unua (en la sesa

jarcento) tradukigis verkojn el la helena kaj hinda lingvoj en la persan, ĉar li konsciis pri la bezono riĉiĝi per la scioj de aliaj kulturoj. Krome, lingvoj ligiĝis ne nur al imperioj, sed ankaŭ al religioj. Kristanoj lernis aliajn lingvojn por konverti la koncernajn popolojn kaj skribigi la sakrajn tekstojn. Oni jam menciis kaŭkazajn popolojn, sed misiistoj ankaŭ helpis evoluigi la gotan lingvon (sankta Ulfilo, kvara jarcento), kaj poste, en la naŭa jarcento, la fratoj Kirilo kaj Metodio inventis la glagolican por skribi la slavan lingvon, kiun oni uzis eklezie. ■

Por pli profundiĝi pri la temo: en Esperanto mi verkis kelkajn artikolojn, kiuj ligiĝas al la temo, ekz. en la aktoj de la IKU-oj de Rejkaviko (2013, pri la du partoj de la romia imperio en la kvina jarcento, 'La du sortoj de la romia imperio) kaj de Montrealo (2020, 'Romianoj kaj persoj en la malfrua antikvo: milito, arto kaj kulturo'). Ĉi tiujn kaj aliajn kontribuadojn oni povas trovi senprobleme en academia.edu surrete ; mi ankaŭ pretigas tradukon de la *Persaj militoj* de Prokopio. En aliaj lingvoj abundas kontribuadoj, ĉefe en la angla. Mi rekomendus A.D. Lee, *Information and Frontiers. Roman foreign relations in late antiquity* (Kembriĝo, 1993), kies unua ĉapitro analizas romiajn kapablojn en siaj rilatoj kun eksteraj potencoj. La rolon de lingvoj en la kristanigo de popoloj traktis lastatempe Yulia Minets en *The Slow Fall of Babel. Languages and Identities in Late Antique Christianity* (Kembriĝo, 2021).

QUÈ ENS PODEN EXPLICAR ELS DIPLOMES MEDIEVALS SOBRE LA LLENGUA DE CATALUNYA?

Anahí Álvarez-Aguado
Universitat de Barcelona

És difícil fixar una cronologia exacta per al moment en què les llengües romàniques es diferenciaren del llatí a cada regió d'Europa perquè, a més, es tracta d'una gènesi que varia d'un domini lingüístic a un altre. El primer document en què es percep ja la consciència de parlar una llengua diferent del llatí el trobem en el domini del francès, en una disposició del Concili de Tours de l'any 813. En aquest document, escrit en un pulcre llatí carolingi, s'ordena que els bisbes tinguin cura de traduir les homilies a la llengua romànica i a la germànica, a fi que tothom les pugui entendre. Aquest decret constata l'existència d'una altra llengua diferent del llatí que, a més —i això és molt significatiu—, és reconeguda com a llengua de predicació. Pel que fa a la resta de territoris, es postula un període de transició del llatí a les llengües romàniques que abraça uns dos segles, entre l'any 600 i el 800. A Catalunya, el romanç català va anar apareixent de manera incipient i progressiva des del segle IX en els documents escrits en llatí i es pot afirmar que des d'aquest moment i fins al segle XII convisqueren dues entitats lingüístiques: el llatí, circumscrit a uns contextos específics, i la llengua col·loquial parlada, el català, que influeix sens dubte en la primera.

En efecte, el llatí no només va perviure en les llengües romàniques d'Europa, sinó que va continuar existint, de manera ininterrompuda com una preservació erudita en els àmbits de la literatura, de la ciència, del dret i de l'Església. De fet, durant centenars d'anys, tingué el predomini en la pràctica escrita medieval i va continuar vigent com a entitat lingüística pròpia dels afers administratius i culturals fins ben entrats els temps moderns.

Un dels problemes importants quan parlem de *llatí medieval* és que ens hem de referir, amb una mateixa denominació, a totes les variants que proliferaren arreu d'Europa des del segle VI fins el XVI d'una llengua de cultura apresada i sense parlants espontanis. Això que s'ha convingut a anomenar *llatí medieval*, doncs, no deixa de ser una modalitat escrita i artificiosa del llatí, de la mateixa manera que ho fou el llatí culte en època romana al costat del llatí vulgar, la llengua del poble. Per tot això, segurament sigui més correcte parlar de *llatins medievals*, més que no pas d'un únic i uniforme *llatí medieval*¹.

Certament, a Catalunya fou abundantíssima la producció de textos do-



cumentals de caire notarial i jurídic redactats en llatí i, gràcies a la importància que tingué el testimoni escrit en l'alta edat mitjana, ens ha arribat un interessantíssim i abundós corpus de textos i diplomes². L'eminència del testimoni escrit es tradueix en l'àmplia i variada diversitat de tipologies documentals que ens han pervingut, tant d'àmbit civil com eclesiàstic: testaments, donacions, compravendes, permutes de terres i possessions, actes de consagracions d'esglésies, juraments de fidelitat, entre molts altres. Enmig d'aquest reguitzell de documents notariais, de caire eminent-

1 PÉREZ 2008: 49-50; 98.

2 ZIMMERMANN 2003: 9.

ment formulari, es poden trobar també alguns textos amb certes pretensions literàries, com ara les poesies i les epístoles de l'abat Oliba, o alguns dels diplomes escrits (o dictats) per Ermengol Bernat d'Urgell, jurista de notable prestigi que ostentà un ús fi i erudit de la llengua llatina clàssica¹.

Amb tot, en general ens trobem davant d'un conjunt documental de caràcter notarial i jurídic, que ofereix alhora una informació molt valuosa sobre la vida d'aquell temps i que pot resultar interessant no només per a l'historiador o el filòleg, sinó també per a qualsevol persona que es vulgui acostar a l'alta edat mitjana del nostre terrer.

Però quines són les característiques del llatí medieval d'aquests textos? Es tracta d'una llengua que, tot i no parlar-se, és variable, perquè seguí gaudint d'una certa vitalitat per tal d'adaptar-se a la nova realitat. Per a explicar aquesta característica, el llatí alemany Ludwig Traube se servia d'una imatge (en certa manera escabrosa), segons la qual el llatí medieval és com una mena de cadàver, les ungles i els cabells del qual continuen creixent². Però, a parer nostre, és Joan Bastardas qui ofereix una definició més precisa d'aquesta complexa realitat del llatí en l'edat mitjana: el llatí medieval és el llatí que s'escriu o es parla quan allò que el comú de la gent parla ja no és llatí³, la qual cosa n'explica moltes de les particularitats i peculiaritats.

Des del punt de vista del lèxic, el llatí d'aquest corpus notarial és una barreja de termes propis del llatí literari d'etapes anteriors, de mots romànics, de termes procedents del llatí vulgar, alguns d'introduïts pels cristians i, finalment, d'innovacions lèxiques de l'edat mitjana. Tot això, és clar, en un context en què la llengua parlada en el nostre domini lingüístic era el català. Ara bé, malgrat la natura artificialiosa i forçada d'aquest llatí, en-

senyat als centres de coneixement i relegat als àmbits eclesiàstic i administratiu, calia adaptar-lo a les noves realitats i per això estigué fortament influït per la llengua parlada. A més, el coneixement del llatí per part dels eclesiàstics i dels notaris era molt heterogeni. Això explica la presència constant d'oscil·lacions gramaticals, sintàctiques i morfològiques. Conscients que el llatí que escrivien ja no era la llengua en què s'expressava el poble, els escriptors, conhortats per la natura formulària dels diplomes que havien de redactar, havien de recórrer a diversos mecanismes per poder adaptar la llengua a la nova realitat, com ara la incorporació de neologismes i els canvis semàntics de termes ja existents. En aquest sentit, fou molt important la influència del feudalisme en les estructures socials, que comportà la creació d'un nou lèxic per adaptar la llengua a aquesta nova realitat. Com que per a alguns conceptes de nova implantació no existia una denominació pròpiament llatina, a partir del segle IX, i especialment durant els dos segles següents, la presència de trets, mots, expressions i fragments en romanç és cada cop més freqüent, sobretot en els camps de nova creació, especialment els vinculats a la vida quotidiana, com ara el camp semàntic tèxtil, el dels aliments i els estris per cuinar i el dels oficis.

Durant aquest període, doncs, ens trobem davant d'un llatí farcit d'innovacions lèxiques i semàntiques, així com de variacions gràfiques motivades per la influència de la llengua romànica. A tall d'exemple, als documents s'hi poden llegir a bastament testimonis de mots propis del català, com ara *follador* 'cup per a trepitjar raïm', *blancher* 'adobador', *moliner* 'moliner', *bufador* 'bufador' o *cabfog* 'capfoguer'⁴. Igualment habitual fou el fenomen invers, això és, el de romanització dels termes llatins.

Sendube elstara estas kroatino Spomenka Ŝtimec (1949), aŭtorino de tuta aro da verkoj: romanoj, noveloj, leteroj, teatraĵoj, vojaĝraportoj, memoraĵoj, biografioj, eseoj, tradukoj;

plenajn paĝojn dediĉas al ŝi kaj CEOLE¹ (p. 481–485, kun ampleksaj citaĵoj el diversrevuaj recenzoj) kaj HEL² (p. 397–398, kun argumentita literaturkritika juĝo). Ne senkaŭze ŝi estis unu el la kvin proponitoj far la Esperanta PEN-Centro por kandidatigo por la literatura Nobelpremio post la forpaso de Marjorie Boulton. Restrikte al la limigita temo de virinoj en romanoj de virinoj, ĉefas la aŭtobiografia *Ombro sur interna pejzaĝo* (Edistudio, 1984)³, tradukita al ses lingvoj. Tristas la forvelko de sesjara kunvivado kun alilandano (ne specifita, fakte usonano): kio ŝajnis interresa, entuziasmiga, feliĉiga drivas lante al sinko, dum interna voĉeto ŝin admonas, konsilas, persvadas, dirante

- 1 Sutton, George: *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, Mondial, 2008.
- 2 Minnaja, Carlo & Silber, Giorgio: *Historio de la esperanta literaturo*, lf-koop, 2015.
- 3 Fragmento el ĝia komenco troviĝas en HEL, p. 687.

ke la afero estis fatale antaŭvidebla. La amikoj embarasige demandas pri li, kaj pri li rememorigas scenoj, konatoj, epizodoj, emocioj, leteroj. Malfacilas kutimiĝi al soleco, kaj volo resupreniri el tiu sinka profundo iĝas la ĉefa resurso de ŝia plua vivo. Abrupte prezentiĝas okazo: malnova kongresa amiko (la tuta vivo de Spomenka ja plene trempiĝis en la esperantista atmosfero) sin anoncas kiel gasto, kaj sen antaŭplano “vespermanĝis geamikoj, vekiĝis geamantoj”⁴. Sed ankaŭ tiu epizodo restas nur epizodo, nova renkontiĝo ĉe kongreso estas banala; tamen la lastaj linioj de la verko estas ankoraŭ optimismaj pri plia ebla ŝanco... La aŭtorino nin kaptas ne nur per la profundeco de la sentoj (disiĝo inter partneroj estas, finfine, ne malofta sperto), sed per la delikateco per kiu ŝi retravivas sian paseon: ĉe la disiĝo la viro supraĵe ĉirkaŭbrakas ŝin, eliras grandpaŝe fermante post si la pordon, kaj ĉio finita; fluas larmoj, ja nur ŝiaj, kompreneble.

4 P. 113.

Ankoraŭ ĉefe aŭtobiografia estas *Kroata milita noktlibro* (Pro Esperanto, 1993), sed ne nur pri si mem rakontas Ŝtimec; alia virino majestas en ŝia romano *Tilla* (Edistudio, 2002), biografio pri la aŭstra dancistino kaj aktorino Tilla Durjeux (1880–1971), tre aktiva en Germanio dum la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento: trifoja edzino, persekutata de la nazioj ŝi rifuĝas en Jugoslavion kun falsa hondurasa pasporto. Rekonita kiel teatra aktorino iam rolinta en *Don Carlos* en Zagrebo ŝi daŭre timas esti persekutata, kvankam tiama Jugoslavio ankoraŭ aspektis nedanĝera.

La rakontado far Ŝtimec pri ĉi tiu fascina virino postulas ege partoprenatan ir-revenon en ties memoraĵoj. Reaperas en ŝia menso, kaj surmetiĝas kun la postaj, la plej fruaj jaroj, la unua edzo, pentristo Eugen Spiro, de kiu ŝi post du jaroj divorcas enirinte en la grandan, ankaŭ finance, medion de teatro, pentrarto, skulptado; jen en 1910 dua edzo, artvendisto kaj ekspoziciisto Paul Cassirer, jen la portreto en Parizo far Renoir en 1914, jen la berlinaj jaroj, kun la patrino mishumora ĉiam ŝin akompananta kaj ĉiam ŝin kontraŭanta, jen la suferplena flankenigo far Paul, kaj decido divorci tra advokato: Paul, kunvenigita por subskribi la akton, pafas al si en la advokata flankĉambro mem: “Vi restos ĉe mi!”⁵ (1926). Morto sekvas post kelktaga restado en hospitalo, kaj la familio de Paul ĉiam konsideris Tillan responsa pri tiu tragedio. Ankaŭ la filo de Paul suicidis kiam dekokjara tuj post la fino de la unua militego, dum Tilla estis en munkena hospitalo, kaj la familianoj atribuis al ŝi ankaŭ tiun antaŭan malfeliĉon. Kvar jarojn poste ŝi aliris sian trian edziniĝon en Londono kun judo Lutz (Ludwig Katzellenbogen), direktoro de bierkompanio kaj artkolektanto, jam eksedziĝinta kaj lasinta siajn du ĝemelajn infanojn al ilia patrino Estella. Pro la ekonomia krizo fine de tiu jardeko bankroto baldaŭis, sed ne tiu estis la kaŭzo de nova katastrofo: Hitlero ekregis en Germanio

kaj la kontraŭjuda kampanjo atingis ankaŭ la teritoriojn trafitaĵajn de la regado nazia, aŭ satelita, kiel la ustaŝa en Kroatio. Tilla rifuĝis al Zagrebo, kie ŝi restos dudek jarojn, kaj instalas artlernejon en strato Jurjevskaja; Lutz, enprizonigita en Grekio kaj de tie al koncentrejo Sachsenhausen, forpasis en 1944. Post la milito ŝi revenis al Germanio, ankoraŭ rikoltante teatrajn kaj filmajn sukcesojn; germanaj kaj jugoslavaj teatroj ŝin omaĝis, kaj kortuŝe Ŝtimec kronikas pri ĉi tiu lasta vivperiodo: *Tilla mortis en Berlino la 22an de februaro en 1971. La februara mortotago estis la centa naskiĝtago de Paul Cassirer. Oni funebris en teatroj ambaŭflanke de la berlina muro. Oni enterigis Tilla en la tombon de Paul Cassirer. Post tiom da jaroj ŝi definitive restis ĉe li. [...] La najbarino konservis la parfumboteleton de Tilla. Se dum suna tago oni flaras ĝin, nenio sentblas. Sed aŭtune, dum la nebulo kovras la korton de Jurjevskaja kaj la kolomboj kunsidiĝas por varmiĝi sur la breton de la ronda tegmentefa fenestro, iu malfortaodoro leviĝas el la boteleto. Tiel odoras la pasinteco.*

Ankoraŭ pri virino traktas la romano *Hodler en Mostar* (Edistudio, 2006), ĉar protagonistas ne ja Ferdinand Hodler (1853–1918), plej fama svisa pentristo de sia epoko, patro de la UEA-kunfondinto Hector, sed lia ĉefa amatino kaj modelino Jeanne Charles. Ankaŭ ŝi trairas emociplenan vivon en du kontinentoj tra edzoj, amantoj, vojaĝoj, militoj. Rolas ankaŭ la valoro de la pentraĵoj de Ferdinand, kiujn Jeanne kunportis el la forlasita ateliero, sed ŝi mem estis pentristino, desegnante laŭ la stilo de sia instruisto Ferdinand, kiel ankaŭ de Hector, kiu pentris sub la instruo de sia patro. Konsista ero de tiu riĉaĵo estis privata arta kolekto de Jeanne en Mostar, poste vendita al la galerio de Serajevo. Spomenka esploras la normalan vivon de Jugoslavio inter la du militegoj.

Mankas en la *Enciklopedio* kaj en la *Libro de romanoj* de Benczik la unua esperantlingva romano verkita de virino, *Lilio* (1918), de Edyth Alleyne

Sinnotte (1870–1947). Pri ŝi CEOLE (p. 67) minimumas pri biografiaĵeroj (mankas eĉ mortodato) kaj nur transskribas juĝojn ĉerpitajn ĉe Tazio Carlevaro el *Esperanto en Perspektivo* kaj ĉe Auld el *Vereco Distro Stilo*; male, abundaj informoj pri ŝia biografio troviĝas en HEL (p. 83, 575), danke al la esploroj de Bill Chapman kaj Katja Steele: malfrua alpreno de kromnomo Alleyne el onklo seninfana, translokiĝo kun la vidva patrino de la naskiĝlando Britio al Aŭstralio en 1894, intensa aktivado en la Melbourne klubo ekde 1905, konatiĝo kun Zamenhof ĉe la ĝeneva UK, vojaĝo al Japanio en 1930, edziniĝo, kiam 59-jara, al aŭstraliano. Vivo fakte riĉa kaj eventoplena; kiom el tio elmontriĝas en ŝia romano, bedaŭrinde delonge elĉerpita kaj ne listigita en la ĉefaj libroservoj? HEL klasas ĝin “larmelvoka historio”, kiel estis tiam laŭmode precipe en francaj felietonoj. Fakte ankaŭ en *Lilio* la tiunoma protagonist(in)o estas “trafata de sennombraj malfeliĉoj”; vidvino senmona kun du infanoj klopodas sin vivteni per lugiĝado de parto de sia modesta hejmo, aldoniĝas malfrua sciigo pri neokazo de supozita suicido, surprizo kiu renversas esperigajn planojn kaj antaŭvidojn, kaj ankaŭ la tragika fino de la romano povas esti konsiderata “feliĉa”, se oni ĉion fidas kaj konfidas al la destindifina Disinjoro. Se entreprenema libroamanto sukcesus ĝin atingi en iu biblioteko, la intrigo aspektas ja olda je unu plena jarcento, sed ĝia legado estus edifa, ĉar la larmomerkato neniam definitive eksmodiĝas; la stilo estas tute flua kaj plene taŭga ankaŭ por komencantoj, ĉar ankoraŭ ne trafita de la neologismemo de la skoloj de la “roranta jardudeko” en Parizo kaj Budapeŝto.

Plenjarcenta transsalto nin kondukas al la rumania hungarino Julia Sigmond (1929–2020), tute nemienciita en CEOLE kvankam ŝiaj dek kvin nelongaj noveloj aperis kolektitaj jam en 2001 en *Mi ne estas Mona Lisa* (Bero), al kiu sekvis spertoj pri geamikoj en *Nomoj kaj sortoj* (2011)⁶.

5 P. 82.

6 Vidu HEL, p. 528.

Sed, ĉar nia temo estas romanoj, la lastan, *Libazar' kaj Tero*, verkitan kun sia edzo Sen Rodin (ps. de italo Filippo Franceschi, 1932–2020) eĉ ne HEL prikraktas, ĉar aperintan ĉe Mondial en 2013⁷. La verko estas difinita de la geaŭtoroj “kvarmana sonato dutonala”: fakte muziko (pri kiu Sen Rodin estis fakulo) plurfoje rolas en ĉi rakonto pri du planedoj en Galaksio PU-44422, kaj abundas eroj, kiujn konantoj de la geaŭtora historio kapablus diveni aŭtobiografiaj. La planedoj gastigas enloĝantojn tute malsamajn laŭ fizika aspekto, mo- roj kaj teknikaj atingoj, sed la fikcio sukcesas ilin kontaktigi: komprene- ble, malgraŭ la distanco kaj la bizara, tamen rapidega, interplaneda komu- niko, naskiĝas amo inter “silanver- ino” de *Libazar' kaj terano*. Verko ple- na de amo: povra forgesita junuleto estas instruata sur la vojo de muziko, kie li rikoltos sukcesojn, la loĝ- antoj de la kvar kantonoj de insulo- planedo *Libazar'*, kvankam rivaloj, tamen sin estimas, severa profesoro Sokrato estas adorata de siaj gestu- dentoj, libazarano montras kiel en 3275 skatoloj, kvankam ja ĉiuj plenaj, tamen je malfermo oni trovas konkre- tan nenion, el kio sekvas prelegeto pri la teorio de la aroj. Multaj fakoj, kiujn ni teranoj taksus lernejoj, estas tuŝitaj, la anoj de unu planedo lernas de tiuj de la alia, kaj leganto rimarkas, ke la du aŭtoroj havas tre skeptikan rigardon al tio kion ni teranoj, eble ne tute prave, nomas “progreso” aŭ “libero”. Stile, ĉarmas la kutimo de pronomo “ci” inter intimuloj, cetere uzita ankaŭ en la reala familia vivo de la geaŭtoroj.

Maleblas distingi kion aŭtoris la edzino kaj kion la edzo, forpasin- taj je kvartaga distanco (antaŭe ŝi) ĉe la unua kovima eksplodo (marto 2020): utilas diri, ke Sen Rodin estis jam edzo, poste vidvo, de esperanto- parolistino ĉe Radio Sofio, al kies voĉo li estis enamiĝinta kaj kun kiu li pa-

7 HEL, kvankam aperinta en 2015, kun postaj apenaŭ ĝisdatigitaj represoj ĝis 2017, prikraktas literaturon nur ĝis 2012 kun sporadaj mencioj pri la du postaj jaroj.

tris du denaskajn esperantistojn; si- avice Julia Sigmond, revuoredaktori- no, profesie pupaktori, ĉiam zorgis pri amuzado de infanoj. La verko estis tradukita en la hungaran, rumanan kaj italan.

La du aŭtoroj aperigis kune ankaŭ *Kvodlibeto – kvarmana mikspoto du- tonala* (EXIT, 2015), elstaran kun- metaĵon vere legindan de noveloj, recenzoj, personaj vivospertoj, po- litikaĵoj el kiuj ajna leganto povus ĉerpi tre edifajn kaj saĝajn instruojn eĉ pri la nunaj krizoj, tiam antaŭ- viditaj en la libro. Foto pri ambaŭ, kun Slatoje Martinov, en la kroatia vilaĝo Hrašćina-Trgovišće ĉe verkista kun- veno organizita de Spomenka Štimec en 2013, aperas en HEL (p. 544).

Malagrabla surprize nemenciita en HEL (urĝas dua ripara eldono), al Sara Larbar (plumnomo de brazila- nino Lilia Ledon da Silva) CEOLE dediĉas plenan paĝon da citaĵoj el di- versaj kritikistoj pri ŝia romano *Ka- rusejoj* (1987, nun 2^a reta eldono en 2015, senpage kaj senkopirajte elŝu- tebla, far la aŭtorino mem). Ankaŭ ĉi-okaze temas pri membiografio, sub nomo Natalia, pri unuaj amaj spertoj en brazila esperanto-medio; fakte amon ŝi serĉas diversmaniere kaj diversetose, ne ja personan, sed ĝeneralan, iel tutgloban amon, es- perantismo-dimensian; pli similan al tiu de Sigmond kaj Rodin ol al tiu persona de Štimec: *Amo, esperanto... eble du branĉoj de la sama plukreskan- ta trunko, kaj - kiu scias? - eble la du semoj el kiuj unike disfloros ŝia vivo*⁸.

Natalia respondecis en infanvartejo pri kunordigado de la tuta reto de aktivecoj en la fako pri virina agado: liverado de proviantoj, medikamen- toj, urĝaj bezonaĵoj. Jen knabineto batita de la patro, kiun ŝi volas pro- tekti; jen ir-revena penso pri Gasto- no, kies bildo pli kaj pli fadiĝas. Kri- zo, sindemandado ĉu plu valoras vivi, ĉu valoras pluvivi, ĉu sin identigi kun filmrolo...

Jen ankoraŭ unu romano aperinta longe post la forpaso de la aŭtori-

8 P. 15 de la 2^a eldono.

no kaj ekster la tempa periodo de CEOLE kaj HEL: *Ho, tomboj de l' pra- patroj* (Iltis, 2015), de Clelia Con- terno Guglielminetti (1915–1984), la “panjo” de la literatura rondo “La Patrolo”. La editoradon de la ma- nuskrripto kuŝinta en preskaŭ for- gesita tirkesto zorgis la plenmerita eksakademiano Reinhard Haupent- hal (1945–2016) akorde kun la filo de Clelia, inĝeniero Renato Conterno. Se la supre prikraktitaj romanoj aspektis antikvaj, la nuna ja raportas pri efek- tiva leter-korespondado de la deka- ŝa (mi ripetas: deknaŝa) jarcento: la rakontantino malkovris kun siaj gefratoj kaŝitan skatolon kun leteroj de la prapatroj. Patrino kaj onklino de la avino de Clelia (do tri generaci- ojn antaŭ ŝi) moviĝas en Novara, fak- te tiam provinca urbeto, nekompare- bla kun Torino, cetere tiam ĉefurbo de la Regno de Sardinio (inkluzivanta ankaŭ la kontinentan regionon Pie- monton): la Regno de Italio kreiĝis nur en 1861, sed Torino rolis prak- tike kiel ĝia ĉefurbo ĝis la konkero de Romo (1870), tiam sub la papa reg- ado. Tra la vido kaj konsideroj de ĉi tiuj du virinoj speguliĝas urbo Nova- ra kun ĉiuj siaj klaĉetoj, komentarioj, deziroj ĉu tiu junulo povus aspiri esti ebla fianĉo (ne, li foriris al milito; ne, ĉar el tro elita familio de la ĉefurbo). Ankaŭ kuzino de la du menciitaj re- liefiĝas: fakte rolas nur virinoj kaj ilia alrigardo al la du socioj, la provinca kaj la ĉefurba, kies diferencoj estis tiam apartigaj. Estis ja la tempo de la kreiĝo de la itala regno, kaj estis tiam ne malgrava pensofluo favora al la strukturo respublika, kun konspiran- toj, klerikoj, karbonaroj, socialistoj, anarkiistoj. Socioj mortas, diseriĝas, senpersoniĝas; tial tristas la librofinaj alineoj: *Neniu el ni ripozas iam sub la silentaj arkadoj de la Novara tombejo. Oni metos nin en tombojn sen historio, en la urbeĝo anonima de la mortintoj tuj ekster Torino, kie oni facile perd- iĝas laŭ la senfinaj egalaj aleoj, inter cent-miloj da dormantoj, inter bedoj perfekte geometriaj. Kaj la tomboj en Novara vane atendas plue etajn fami- liajn pilgrimadojn. [...] Sekaj floroj en renversitaj vazoj. Ho, tomboj de l' pra- patroj...* ■

TEMPOGARDISTOJ: ORIGINALA ROLLUDO LANĈITA DUM LA RENKEJTIĜO

Toni Espinosa

Psikologo, flegisto kaj diletanto



La pasintan februaron ni ĝuis la RenKEJtiĝon, tre bone organizita de nia fierinda kataluna junularo. Dum la renkontiĝo, okazis la prezento de nova surtabla rolludo nomata “Tempogardistoj”. En ĉi tiu historia sciencfikcia rolludo, ludantoj rolas kiel membroj de teamo dediĉita al la riparado de la tempolinio. Ili vojaĝas al gravaj momentoj en la historio de Esperanto, kiel la Unua Universala Kongreso aŭ la Ido-krizo, kaj havas la eblecon interagi kun historiaj personoj.

Rolludoj kaj teatraĵoj delonge estas uzataj kiel instruiloj en Esperantujo.

Tamen, la ludsesioj de Tempogardistoj estas gvidataj de ludestro, kaj oni decidas la rezulton de la agado pere de rolulformularoj kaj de la uzo de ĵetkuboj. Krom tio, la ludantoj povas fari ion ajn kaj ne nur rilate al konkreta scenaro. Anstataŭ esti instrua teatraĵo, Tempogardistoj estas rolludo laŭ la stilo de “Drakoj kaj Galerioj” (Dungeons & Dragons), kiu estis la unua komerca surtabla rolludo, lanĉita en 1974.

En Esperantujo jam ekzistas tradukitaj surtablaĵ rolludoj kiel “Vojtrovanto” (Pathfinder), “Malferma Legendo” (Open Legend) aŭ “Danĝer-

ejoj” (Mazemorritas). Tamen, ĝis nun oni ne trovas originalan rolludan sistemon en Esperanto¹.

Pro tiu manko de originala surtabla rolludo en Esperanto, de longa tempo, mi jam cerbumis pri tio. Sed tiu ideoj restis nur kiel semoj, nekreskinte. Granda bremsito estis la

¹ Rice, Timoteo. “Instrui kaj praktiki Esperanton per surtablaĵ rolludoj.” Usona Esperantisto, vol. 2019, no. 4, 2019, p. 12-13. <https://bulteno.esperanto-usa.org/a/2019/04/00-pdf/bulteno.pdf>.

fakto, ke la tipaj rolludoj ofte enhavas okulfrapajn ilustraĵojn. Bedaŭrinde, mi ne kapablis fari ilin sola, kaj ankaŭ mi ne povis permesi monon por profesiaj ilustraĵoj. Tamen, la alveno de artefarita intelekto malfermis novajn vojojn, kaj mi komencis eksperimenti per ĉi tiu nova ilo.

Sed la pluvo kiu ekkreskigis la semon de “Tempogardistoj” venis de KEJ, komence de novembro de 2023. Tiam, Óscar Hernández proponis al loka societo, interesita pri Esperantaj ludoj, en kiu mi partoprenas, alporti esperantajn ludojn al RenKEJtiĝo. En malpli ol unu monato jam estis pretaj la skiza regularo kaj la aventuro “La okulvitro de Zamenhof”, kaj la loka esperantista grupo de Tarragona faris la unuan beta-teston de la rolludo.

Post tiu unua testo, mi simpligis kelkajn regulojn kaj rolulformularojn, sekvis reta testado kie partoprenis eĉ internaciaj kaj spertaj ludantoj. La ludo montriĝis sukcesa kaj ekvilibra, alirebla por novuloj

kaj engaĝiga por kutimaj ludantoj de rolludoj.

Mi ne nur deziris, ke la rolludo estu verkita en Esperanto kaj ke ĝia enhavo estu pri Esperanto, sed eĉ traplekti en ĝi ideojn pri paco, justeco, interkompreno kaj universalismo. Pro tio, la ludo allogas la ludantojn per esplorado kaj malkovrado, kaj kreas la necesan streĉon kaj danĝeron ne per batalado sed per la koncepto de “tempodistordo”. Do, la kernaj reguloj de Tempogardistoj ne uzas, kaj ne bezonas, batalsistemon. Tio estas ege strange en tipaj rolludoj, kiuj kutime estas konstruitaj ĉirkaŭ reguloj por batalado.

Tamen, mi volis, ke Tempogardistoj estu vera moderna rolludo kaj mi deziras, ke rolludantoj povu havi la kutiman sperton dum rolludado. Pro tio, mi ankaŭ aldonis progresintajn regulojn por estontaj sciencfikciaj scenaroj, kie ludantoj agas kiel protektantoj en kaosa epoko. Tempogardistoj ofertas du ludmanierojn: per bazaj aŭ per progresintaj reguloj. Ili estas kvazaŭ du apartaj ludoj.

Post tio, venis la tempo por finpretigi la verkon. Kontraŭ la horloĝo mi klopodis fari la rolludon plej koha kiel eble. Mi multe ĝuis fari la bildojn uzante artefaritan intelekton. Tamen, gvidi ĝin al kontentiga rezulto ne estis facile atingebla. Tio postulis amason da provoj kaj prilabori ĉiujn bildojn por forigi stragaĵojn. Jam preskaŭ sen tempo, la loka esperantista grupo de Tarragona prolegis la tekston kaj strebis forigi la erarojn. Pro la limigita tempo eblas ankaŭ trovi kelkajn erarojn en la libro.

Tuj mi sendis la arkivojn al interreta laŭmenda presejo, por havi kelkajn paperajn ekzemplerojn por montri ilin en la RenKEJtiĝo. Ni povis spiri trankvile, kiam nur kelkajn tagojn antaŭ RenKEJtiĝo, la libroj alvenis.

Sed tio ne estas ĉio. Tempogardistoj estas tute via. Ĝi estas eldonita sub libera permesilo, do vi povas ĝin uzi kaj eĉ modifi. Ne hezitu dissendi ĝin, presi ĝin aŭ krei viajn proprajn aventurojn uzante ĉi tiun ludalsistemon. ■



Elŝutu kaj ĝuu ĝin:
<https://mallonge.net/tempogardistoj>

ESPERANTO KAJ LA LITERATURAJ PREMIOJ GRAU MIRÓ

Salvador Barrau Viñas

AAVV Coll-Vallcarca

Tradukis Joan Alarcón

La Literaturaj Premioj Grau Miró naskiĝis antaŭ 21 jaroj. Ĝia celo estis publikigi universalan literaturon kaj specife la japanan literaturon, kiel la hajkojn, tankaĵojn kaj la zenajn rakontojn.

La premioj estiĝis en la jaro 2003, en najbara asocio Coll Vallcarca, okaze de la inaŭguro de nova ejo por la adekvataj agadoj pri kulturaj, najbaraj kaj sociaj temoj.

Oni kunvokis la unuajn premiojn en la kastilia kaj la kataluna. La temoj estis hajkoj (japanaj versoj), tankaĵoj (japanaj versoj) kaj mikroverkoj (similaj al zenaj rakontoj).

Poste, en la jaro 2019, oni enkondukis la esperantan mikroverkon al la pre-

mioj, ekde kiam sinjoro Joan Alarcón kun la helpo de sinjoro Pere Fornells aliĝis al ĉi tiu konkurso. Ekde tiam partoprenas gekonkursantoj de Italio, Katalunio kaj aliaj landoj.

La konkurso en la tri kategorioj estas etendiĝitaj al la tuta Hispana reĝlando, sed ne al aliaj eŭropaj landoj por administrataj problemoj kun sendado de mono por la premioj.

Esperanto, dum la 20a jarcento, havis grandan akceptadon en Katalunio, specife en la ĝironaj distriktoj. Laŭ ni ĉi tiu internacia lingvo, facile lernebla, povus esti la senlima lingvo de kelkaj landoj de la mondo, sed okazis politikaj ŝanĝoj post la militoj kiuj malfaciligis kaj nuligis la uzadon de kelkaj lingvoj, kiel en Katalunio.

Ni opinias ke ni devos prezervi la Esperantan lingvon pro la laboro, kiun ĝi povas fari por la interkomprenado de multaj nacioj kaj popoloj en la nuntempa ŝanĝanta mondo, kun la granda migrado de homoj al diversaj landoj de moroj kaj lingvoj malsimilaj.

Ankaŭ pro tio ke oni tradukis, presis kaj eldonis multajn katalunajn verkojn esperante, ni devas klopodi por ke la penado de niaj antaŭuloj ne perdiĝu kaj por oferti ĝin al multaj homoj simpatiantaj al tiu ĉi bela lingvo. La Premioj Grau Miró estas la humila kontribuo de la najbara asocio Coll Vallcarca al la disvastigo de Esperanto. ■

FORPISIS M. JOSEP UDINA, PREZIDANTO DE LA LKK DE LA 39-A KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

Forpasis M. Josep Udina i Abelló. Kuraĝa virino dediĉita al sia urbo, al edukado, al muziko, al familio kaj amikoj; obstina defendanto de la sociaj rajtoj de la civitanoj de Castelldefels.

Loĝanto de Can Vinader kaj magistratano pri Kulturo ĉe la Urba Konsilio de Castelldefels (1983-1987), kune kun Marta Mata ŝi dediĉis sian vivon al plibonigado de edukado kaj edukscienco, kaj iĝis decida figuro en la defendo de Castelldefels kiel edukanta urbo.

Kataluna Esperanto-Asocio konsideris ke ŝi estis la prezidanto kiun ni bezonis por la loka komitato (LKK) de la 39-a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazinta en Castelldefels en la jaro 2022. Ŝi estis unu el la plej obstinaj homoj pri la reakiro de la nomo de Ramon Fernández Jurado por la loka Biblioteko. Ŝi komence rifuzis nian peton, sed fine ni konvinkis ŝin kaj ni povis ĝui ŝian kapablon kunigi la sociajn retojn de la urbo, ŝian laborkapablon kaj ŝian karakterizan bonkorecon. Por ni estis

granda ĝojo, ke ŝi prezidis tiun Kongreson. Kaj ŝi ankaŭ estis kontenta, malgraŭ tio, ke la unuaj simptomoj de la malsano jam aperis.

Kara M. Josep: ni memoros vin porĉiame, ĉar katalune *re-cordar* signifas revivigi tra la koro la sentojn, la emociojn kaj la bonajn momentojn, kiujn ni kunhavis.

Restu pace.

POEZIA ANGULO

Abel Montagut

Verkisto kaj tradukisto

Ausias March (ĉ. 1397-1459; aliaj skriboj Ausiàs Marc, Àusias March, k.a.; prononco: aŭzias' mark) estas la plej elstara kaj influa poeto el la mezepoka kaj ajnatempa kataluna literaturo. Li naskiĝis kaj vivis en la tiama Valencia Regno. Konservigis pli ol cent el liaj poemoj, konsistantaj ĝenerale el ses aŭ pli multaj strofoj. Laŭ Josep Miàs: “Lia poezio pritraktas du ĉefajn temojn fundamentajn por la homa estaĵo: la amo kaj la morto. En lia literatura verkado pri ambaŭ li alvenas al konkludoj kiuj ankoraŭ nun surprizas nin per ilia nuntempeco”.



Jen originalo kaj traduko de la poemo 29, konsistanta el unu sola strofo. La koncerna traduko, fare de Abel Montagut, aperis en 1993 en la libro *Ausias March, Amkantoj / Cants d'amor. 60 poemoj / 60 poemes*:

29

Sí com lo taur se'n va fuit pel desert
quan és sobrat per son semblant qui el força
ne torna mai fins ha cobrada força
per destruir aquell qui l'ha desert,
tot enaixí em cové llunyar de vós,
car vostre gest mon esforç ha confús:
no tornaré fins del tot haja fus
la gran paor qui em tol ser delitós.

29

Kiel fuĝanta taŭro endezertigas sin,
se ĝia samrasano fortrudas kun perforto
kaj ĝi ne plu revenas ĝis plenas ĝia forto,
celante la detruon de kiu pelis ĝin,
tutsame, de vi nepre mi devas nun forkuri,
ĉar via rifuzgesto konfuzis mian penon:
mi restos en ekzilo ĝis atingi la svenon
de l' granda timo, kiu malhelpas min plezuri. ■



Babilu ankaŭ vi en la grupo de KEA en telegramo

Por asocioj, simpatiantoj kaj scivolemuloj

<http://telegram.esperanto.cat>

LA ESPERANTA TARRAGONPROVINCA LIGO

Toni Espinosa

Psikologo, flegisto kaj diletanto

La 20an de januaro 1914 la ĵurnalo “Diari de Reus” publikigis anoncon pri la starigo de la “Esperanta Provinca-Tarragona Ligo” kun la listo de la dek sep lokaj grupoj, kiuj komponis tiun ligon (vidu bildon 1).

De nia tempo facilas miri pro tiutempa svarmo de tarragonaj esperantistoj kaj, kiel turisto, kiu admiras monumenton al la pasinta gloro, oscedeti kaj levi la ŝultrojn. Kontraŭe, ni deziras vivigi la ŝtonecajn datumojn per prezenti al vi la fluon de okazajoj kiuj portis al la kreo de tiu tarragona ligo.


Kvankam ni ne posedas tempo-maŝinon por fari tion, ni ja havas ion, kio malfermos al ni fenestreton al la pasinteco. Tiu ilo estas la libro de aktoj de la loka grupo “Nova Semo” de Reus, kiu estis la motoro de la Esperanta Tarragonprovinca Ligo. En arkivo de Centre de Lectura de Reus oni trovas tiun libron, kiu detale registris kunvenojn ekde la fondiĝo de la grupo en 1911. Leginte la aktojn, verkitaĵoj katalune, esperante aŭ hispane, oni povas rigardi la vivon de la “genovasemanoj”, kiel ili mem sin nomis. Oni ekvidas dediĉon, pasion por la movado, kaj ankaŭ orgojlon kaj jaluzon. Eĉ disputo pro tiu ligo al-

Per «Nova Semo» (Reus), *E. Aguadé Parés*; per «Tarragona Esperanta» (Tarragona), *Inocenci Viñas*; per «Nova Tarragono», «Grop Esperantista de Querol», i «Grop Esperantista de Valldosera», *Joan Molas Sabater*; per «Grop Esperantista de Tortosa», *Tomás Martí*; per «Montsanta Stelo (Ulldemolins)», *Joaquim García*; per «Esperanta Grupo Socialisto» (Reus), *Ramón Pujol*; per «Grop Esperantista de Riudecanyes», *Teresa Estela*; per «Frateco» (Vendrell) i «Laboro Kaj Kulturo» (Calafell), *Joan Martorell*; per «Frateca Kunigo» (Reus), *Josep Huguet*; per «Varda Stalo» (Mir) i «Grop Esperantista de Falset», *Françesc Simó*; per «Grop Esperantista de Cambrils», *Josepa Anguera*; per «Turo Esperantistaro» (Torredembara) i «Grop Esperantista d'Amposta», *Fulgenci Agustí*.

Bildo 1.

venis al la paĝoj de Kataluna Esperantisto.

Anstataŭ ol preni vian pufmaizon kaj sidi en la unua vico de la sidlokejo por spekti la dramserion pri la starigo de la Tarragona ligo, konsideru, ke homoj havas multflankajn celojn pri kiuj eĉ ili mem ne konscias. Do, ni ne asertos pri kiaj kialoj kondukis al la fondiĝo de la ligo. Ni nur montros al vi la eventserion, por ke sekvante ĝin vi faru viajn proprajn konkludojn.



Bildo 2.

PASIEMO KAJ RIVALECO EN LA ESTIĜO DE LA TARRAGONPROVINCA LIGO

La loka grupo Nova Semo estis fondita la 1an de januaro de 1911, ene de la “Centre de Lectura” de Reus (rigardu refaritan ŝildon de la grupo: bildo 2). La grupo estis ambicia. Tuj ili sendis inviton al Zamenhof, oferante al li la honoran prezidantecon de la grupo. Sed la elĉerpita aŭtoro de Esperanto respondis ke li ne povas akcepti la honoron.

En aprilo de 1911 la grupo ricevis leteron de la grupo “Tarragona Esperanta”, kiu invitis Novan Semon al la

2a Kataluna Kongreso okazonta en Tarragona. La grupo de Reus danke partoprenis. Sed antaŭ unu jaro 17 membroj de Nova Semo jam deziris sian propran kongreson. La sekvan peton registris akto de januaro 1912:

“La gesamideanoj subskribantaj de la jena, petegas al la inda Estraro de Nova Semo, demandu al la Estraro de K.E.F. pri okazigo ĉe nia urbo de la IV-a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio.”

Apogante la rezolucion, la grupo kampanjis en la lokaj ĵurnaloj por Esperanto kaj vizitis la urbestaron de Reus por prezenti la kongreson kiel profitan aferon por la urbo. Eĉ ni hazarde trovis poŝtkarton de la 15a de majo de 1912, kiu konstatas la strebadojn de la grupo. Laŭ la subskribo, ĝi ŝajnas esti sendita de la sekretario de la Kataluna Esperanta Federacio, Estanislau Pellicer, al Enric Aguadé, tiama vicpresidanto de Nova Semo. La poŝtkarto enhavas la jenan konsilon:

“Ricevinte vian leteron, estu trankvila, mi ne sendis cirkuletojn al la grupoj. Ankaŭ la grupoj el Olot postulas la IV-an Kongreson, do vi devas vin lertigi.” (en la kataluna)

Sed en la III Kataluna Kongreso en Terrassa venis seniluziiga bato por la membroj de Nova Semo. La akto de la 10a de julio de 1912 de la grupo informas, ke la kandidataro de Reus ricevis 73 voĉdonojn kontraŭ 93 favore al Olot. Ankaŭ estas komunikaĵo de KEF, kiu asertas, ke ĝi tute favoros la realigon de la IV-a kongreso en Reus.

Tempo pasis, kaj, kiel dirite, en la Kongreso de Olot, okazinta la 11-12an de majo de 1913, la sekva kongreso estis oferita al Reus. Sed imagu la vizaĝon de la oferantoj, kiam Enric Aguadé, nome de Nova Semo, “honore rifuzis ĝin” tiel kiel registras la akto de la 20a de junio de 1913 de la grupo. Tiamaniere la 5a kongreso estis farota en Sant Feliu de Guixols, kie la esperantistoj ne devus esti tiel ofendiĝemaj kiel en Reus.



Bildo 3.

La okazaĵoj pensigas, ke post la malgajno de kongreso, la ofero de la sekva kongresloko estis spertita kiel senhonoriga indulgemo. Ŝajnas ke la reŭsa grupo decidis investi ĝian forton en aliajn celojn. En septembro de 1913 tiu anstataŭa vojo efektiviĝis, kiam Nova Semo elektis komitaton por aranĝi Esperantan Provincan Asembleon. Tiutempaj glumarkoj vidigas la konkurencon inter ambaŭ projektoj (bildo 3).

Nova Semo eĉ ne sendis apartan delegiton al la kongreso de Sant Feliu, estante reprezentita pere de la “genovasemanoj, kiuj ĝin ĉeestos”.

La 8an de oktobro 1913 estis sendita cirkulero al la tarragonaj grupoj, kun elektita komitato de Nova Semo. Enric Aguadé de Nova Semo estis la prezidanto kaj Domènech Obiol de Tarragona Esperanta la vicprezidanto. Bedaŭrinde tiu interkonsento ne multe daŭris.

En la februara numero de Kataluna Esperantisto de 1914 aperis anonco pri la starigo de la ligo, sekvita de protesto de Domènech Obiol, ĉar la Ligo estis fondita de ne ekzistantaj grupoj.

En akto de Nova Semo de tiu monato oni povas konstati la streĉitan rilaton inter la ĉefaj grupoj de Reus kaj Tarragona. La grupo Tarragono Esperanta sendis protestleteron pri la starigo de la Ligo al la prezidanto de Nova Semo. Fakte je la momento de la starigo de la ligo, la prezidanto de la Tarragonligo kaj de Nova Semo estis la sama homo: Pere Aguadé Montserrat (tuj sekve, Enric Aguadé Parés estis la prezidanto de Nova Semo). Anstataŭ pacigi la situacion, Nova Semo respondis per malĝentila, tro formala ekskuzo: “Tiu-ĉi Estraro decidis sciigi al “Tarragono Esperanta” ke ili devas turni sin al Sro. Prezidanto de la E.P.T.L.”

DE LOKA DISKUTO AL PUBLIKA DISPUTO

La malakordo tamen ne finiĝis tiam. Anstataŭ solvi la problemojn lok-nivele, ili turnis sin al la tuta Kataluna Esperantistaro. En majo de 1914 en la revuo Kataluna Esperantisto aperis artikolo de Enric Aguadé. En tiu artikolo Aguadé agnoskis la hontindan situacion dirante, ke li skribis en la kataluna por eviti ke fremdaj observantoj ekscius pri la problemo. Li raportis, ke post diskuto pri la statutoj de la ligo, li kaj Obiol kandidatigis por la prezidanteco de la ligo antaŭ la delegitoj de la dek sep grupoj. Enric Aguadé akuzis Domènech Obiol de tio, ke li ne akceptis la estarigon de la ligo, dirante, ke estis ne leĝaj grupoj tie, simple ĉar li estis la malgajninto de la voĉdonado.

La respondo de Obiol aperis en la julia numero de 1914 de la revuo. Li asertis, ke la grupo el Reus monopolis la estraron de la ligo, malkonsentis pri la ekzisto de dumvivaj lokoj kaj asertis, ke la voĉdonado por la estigo de la ligo la 11an de januaro 1914 estis neleĝa, ĉar partoprenis grupoj kiuj ne reale ekzistis. Li finis dirante, ke li ne plu daŭrigos la disputadon.

Fakte, el la ses postenoj menciitaj en la februara numero de Kataluna Esperantisto de la Esperanta Tarragonprovinca Ligo, kvar estis kutimaj estraranoj de Nova Semo. De la duaj ceteraj membroj, unu estis membro de la ĵus kreita grupo “Nova Tarragono”.

La aperigo de suspektinda anonco de tarragona ĵurnalo¹ prezentante la novan estraron de Nova Tarragono, ĵuste la tagon kiam la Ligo estis fondita kaj ke membro de tiu grupo partoprenos en la estraro de tiu Esperanta Tarragonprovinca Ligo, pensigas nin, ke tiu Nova Tarragono estis la neleĝa grupo pri kiu Domènech Obiol parolis.

1 “La Cruz”, 11an de januaro de 1914

LA FINO DE LA ESPERANTA TARRAGONPROVINCA LIGO

Ŝajnas, ke la utila vivo de la Esperanta Tarragonprovinca Ligo nur daŭris ĝis 1917, kiam okazis sia tria kaj lasta asembleo en El Vendrell. Tie partoprenis preskaŭ tridek membroj de Nova Semo kaj kelkaj lokaj esperantistoj². Do, tiam la ligo jam funkciis pli kiel parto de Nova Semo ol kiel vera provinca ligo.

Tiujare estis mencio pri projekto de la kvara liga asembleo en Valls en la libro de aktoj. Sed post tio la libro registras nur unu alian sesion antaŭ ol silenti dum pli ol tridek jaroj, ĝis 1949, kiam aperis du aktoj kun la intenco revivigi la grupon.

Eblas pensi, ke la vivforto de la Tarragona Ligo dependis de du grandaj faktoroj: la ĝenerala stato de la esperantismo kaj la loka subteno. Ambaŭ aspektoj estis malfacilaj. Kvankam en 1916 la 6a Kataluna Kongreso venis al Reus, pro la mondmilito la katalunaj kongresoj interrompiĝis dum du jaroj.

En la libro de aktoj ni ankaŭ trovas akton de januaro de 1915, kie Enric Aguadé proponis la haltigon de la grupo pro “la neordinaraj cirkonstancoj kiuj regas Eŭropon”. Al tio fervore kontraŭstaris Teresa Barrufet, kiu opiniis, ke “la esperantaj grupoj devas servi la entuziasman fajron, kiu devas aperigi plej brilanta nia stelo post tiu-ĉi terura milito”. Ni rimarkis la signifan partoprenon de virinoj en la estraro de Nova Semo; en 1916, ĝi estis konsistanta el kvar virinoj kaj kvar viroj.

Ekde 1914 la kunsidoj de Nova Semo okazis pli kaj pli malregule³. Ankaŭ

la aktoj redaktiĝis kun ĉiam pli da malzorgo, sen iuj subskriboj kaj kun menciadoj de datumoj, kiuj finfine ne estis skribitaj.

Kvankam la grupo ne plu registris aktojn, oni povas trovi mencion pri Nova Semo en Kataluna Esperantisto en aŭgusto de 1924, kiam Enric Aguadé partoprenis la 9-an Kongreson reprezentante tiun jam fantoman grupon. (Tio ne estis lia plej stranga reprezentado: en 1939, je la fino de la hispana milito, li estis urbestro de Reus dum ses tagoj⁴).

Frazo dirita de Zamenhof dum la 8a Universala Kongreso bone resumas la sorton de la Tarragona Provinca Ligo: “per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune”. Kvankam, verŝajne, la haltigo de la ligo estis ne evitebla pro la sociaj kaj politikaj problemoj, eble la ligo jam naskiĝis kun morta malsano pro interna kverelado kaj miskompreno.

Diskuti kaj malkonsenti estas tute normala afero. Strukturoj staras danke al streĉo: tensio kaj harmonio ne estas nepre kontraŭaj ideoj. La eraro de la tarragonaj ligoj estis uzi ilian energion por disputi unu kontraŭ la alia, certe, kun seniluziiga efiko.

Ni dankas al vi por via spektado de la dramserio de la Tarragonprovinca Ligo. Kvankam ni strebis esti historie ĝustaj, nia celo estis vekii vian intereseon kaj scivolemon: do, indulgu se ni estis iomete romanemaj. ■

2 “Foment”, 16an de majo de 1917

3 Ni kalkulis tagojn inter la kunvenoj kaj eltrovis la normalajn deviojn por ĉiuj jaroj. Tiuj ciferoj ne rekte rilatas al la kvanto da kunvenoj sed al kiom regule ili okazis. Ju pli alta la cifero post la jaro, des pli malregule okazis la renkontiĝoj dum tiu jaro. 1911: 13.28, 1912: 11.59, 1913: 12.18, 1914: 31.64, 1915: 39.91, 1916: 50.61, 1917: 70.11.

4 Duch, Montserrat. Reus sota el primer franquisme 1939-1951. Reus: Associació d'Estudis Reusencs, 1996, p.193.

CANVI EN EL CONSELL DE REDACCIÓ DE *KATALUNA ESPERANTISTO* EN TEMPS DE DICTADURA



Jaume Grau Casas

Xavier Margais Basi
Historiador

El cop d'estat de Miguel Primo de Rivera comportà desorientació en el moviment esperantista per mor del tancament de l'Ateneu Enciclopèdic Popular on tenia la seu la Federació Catalana d'Esperanto. El redactor de *Kataluna Esperantisto*, Jaume Grau Casas, va abandonar el càrrec i va pronosticar, en el darrer número de l'any 1923, la desaparició de la revista i pràcticament la mort del moviment esperantista català. Ell n'havia estat el redactor des de 1921 –moment en que s'ençetava una nova època, la segona- fins al darrer número de 1923 en què es planyia pel que li semblava la fi del moviment. Encara el primer número de la revista del 1924, juliol-agost apareixia guiada pel seu bon fer. El va

substituir un equip liderat per Delfí Dalmau, que fou ajudat per Sebastià Chaler, Ramon Marsà, Artemi Barba, Francesc Pérez, Joan Gili, Jaume Herp, Marian Solà i els germans Alberich, Josep i Sebastià. No queda clar si el nou equip de redactors no volien deixar marxar Jaume Grau Casas, tota vegada que li demanaren que fes el report del congrés celebrat aquell mes de juny a Vic, l'onzè de KEF, i també dels Jocs Florals Internacional. Ell ho feu diligentment.

Vist amb la distància que proporciona el temps, aquells dos esdeveniments foren un èxit esclatant tant per la bona organització com pel nivell literari i cultural assolit. En ambdós també hi va haver moments de joia

i emoció com quan Delfí Dalmau en representació de Kolomano de Kalocsay, guanyador de la flor natural, llegí *Kisoj* l'obra premiada. L'emoció encara augmentà després del parlament de Joan Barceló Andreu, qui en representació de l'esperantisme mallorquí demanà als assistents allí congregats que acceptessin Palma com a seu del dotzè congrés de la Federació Catalana d'Esperanto (KEF), a celebrar la primavera de 1925.

Efectivament, la perspectiva de viatjar a Mallorca i de passar la nit en el vaixell era embriagadora i per als temerosos anunciaren que la mar acostumava a ser reposada al maig-juny. ■

BUTIKO*

butiko.esperanto.cat

Serĉu kaj aĉetu vian libron, revuon aŭ diskon en nia retbutiko
Cerca i troba el teu llibre, revista o disc a la nostra botiga en línia

BATALO DE GIGANTOJ: KIAN MULTLINGVISMON NI DEZIRAS?

Alina Moser

Grupo de Lingvistoj por Diverseco (GLiDi)

Tradukis Alfons Tur



Tiun ĉi someron, kelkaj membroj de GLDiDi, en kunlaboro kun la Departamento pri Edukado (Kataluna Aŭtonoma Administracio) organizis someran studrondon pri la mastrumado de lingva diverseco en la klasoj adresita al la instruistaro, kaj tie ekaperis diversaj interesaj pripensoj de la partoprenintoj. Tial mi invitas vin esplori koncepton firme ligitan al lingva diverseco kaj al ties percepto, akcepto, valorigo kaj, ideale, al ĝia enkonduko en la edukad sistemon kaj en la ĝeneralan socion: multlingvismon.

En mia devenlando, Germanio, mi estis bonŝanca ĉar ricevis edukadon

”

Ni alfrontas iaspecan lukton de gigantoj, la plimulto el ili okcidentdevenaj kaj koloniismaj, absolute malegaleca rilate al la ceteraj mondaj lingvoj, inklude eĉ tiuj de multaj kuncivitanoj

kiun oni povus nomi multlingvan. Fakte temis pri du cirkonstancoj tute neligitaj kaj iamaniere hazarde okazintaj. De unu flanko, parto de mia patra familio devenas el Hungario kie mi povis ofte somerumi infanaĝe. Aliflanke, mi povis ĝui multlingvan edukadon. Mi volus substreki ke mi pasigis mian tutan instruigon en la publika germana studsistemo. Mia bonŝanco estis ke mia gimnazio ofertis dulingvan franc-germanan studlinion (la gimnazio en Germanio komencas post la kvara jaro de la baza edukado) kaj mi eklernis la anglan kiel duan fremdan lingvon en la sepa kurso (ekvivalenta al la 1a kurso de ESO en la aktuala hispanŝta-

ta studsisistemo). Danke al tiuj spertoj mi povis ekkoni tri lingvojn kiuj estigis en mi la emon lerni pliajn. Tiel ke, deknaŭ jaraĝa mi decidis vojaĝi suden kun la celo plivastigi mian personan lingvan trezoron al kiu aldoniĝis la kataluna kaj tuj poste, (oni povas diri ke neplanite) la hispana. La vera enamiĝo al la lingvoj de la mondo ne okazis tamen ĝis kiam mi ekkomencis miajn studojn pri lingvistiko ĉe la Barcelona Universitato. Ankoraŭ mi devis trakuri longan vojon por atingi la veran diversecon kaj senti nebridblan deziron ĝin ekkoni kaj protekti.

Nuntempe mi restas dankema pro la ricevita edukado. Tamen, mi daŭre konstatas kun bedaŭro la etnocentrismen percepton kaj, kial ne diri, kapitalisman de la multlingvisma koncepto kiun oni ofte diskonigis en kaj ekster la klasĉambroj. La lingvolernado kiun oni grandparte daŭrigadas (tiel en Germanio, kiel en la Hispana ŝtato) fokusigas ĝis nun preskaŭ centprocente en lingvoj kiaj la angla kaj la franca, kaj, foje la latina, la hispana (en Germanio), la ĉina kaj la rusa. Jen do, ni alfrontas iaspecan lukton de gigantoj, la plimulto el ili okcidentdevenaj kaj koloniismaj (tial la etnocentrismo), absolute malegaleca rilate al la ceteraj mondaj lingvoj, inklude eĉ tiuj de multaj kuncivitanoj.

Se la reganta koncepto pri multlingvismo estus pli konscia pri la diverseco, dum mia studtempo mi estus povinta lerni lingvojn el la medio kiuj povus esti pontojn en la socia sfero, kiel la turkan, la persan, la polan, se mi devas mencii lingvojn de etnaj grupoj novalvenintaj aŭ kunloĝantaj jam de du aŭ tri generacioj en Germanio. Memkompreneble, oni povus aldoni centojn da aliaj lingvoj. Ni konsciu ke nur en Katalunio estas parolataj pli ol 300 lingvojn! Fakte la amaziĥa estas la tria pli parolata (por pliaj informoj bv. legi tiun ĉi artikolon de Mònica Barrieras) kaj, tial povus esti agnoskata kiel lingva "giganto" ĉe ni. Tamen malmulton oni instruas ankoraŭ en la lernejoj. Ni denove renkontas la etnocentrismen antaŭjuĝon kiu malalproksimigas nin de la mult-

lingva realo, eĉ kiam ni havas ĝin antaŭ ni: en la klasĉambro, surstrate, en la laborejoj.

Tial indas sin demandi: Kian multlingvismon ni deziras? Ek de la komenco, valorus la penon memori ke, preter la graveco koni lingvojn kadre de la globalizita mondo, la fakto (re) koni la lingvan diversecon estas gravega por la homaro. Ĝi gravas ĉar ni ĉiuj rajtas senti nin agnoskataj en la propra diverseco ĉie, kaj ĉiukaze la unulingva parolanto ne ekzistas, kiel jam klarigis Elisabet Oliver. Ankaŭ ĝi gravas por instruistoj, tiel ke ili povu pli bone okupiĝi pri la lernantoj kun iliaj devenaj lingvoj kaj kulturoj. Laste, ĝi gravas ĉar lingvoj estas kultura havaĵo de la homaro. Por tion konstati sufiĉas pensi pri la diverseco de specoj kaj la bunteco de kulturajoj ligitaj al iu lingvo kaj kiuj riskas esti perditaj kiam oni permesas formorti lingvon kaj ties asociitan kulturon. (por pliaj informoj mi rekomendas la tekston de Pere Comellas)

Tiu ĉi rezonado devintus nin celi al diversa multlingvismo, sed eĉ pli, ĝi montras ke ni devus celi al multlingvismo kritika kontraŭ la lingvaj antaŭjuĝoj. Ĉar en la Germanio de antaŭ 25 jaroj, kiam mi ekstudis en elementa lernejo apud la filoj de kroatiserboj, slovenoj, marokanoj kaj turkoj, kultura kaj lingva diverscoj estis tute alie komprenata. Tiam, korekte paroli la germanan kaj vivi laŭ la germankulturaj stereotipoj ŝajnis la nura deca strebo de novalvenintoj kaj ties gefiloj. La rezulto de tiu percepto estis teruraĵoj, kiel la fakto ke multaj gefiloj de novalvenintoj ne sukcesis regi iun lingvon ĝis la adolesko, ĉar iliaj gepatroj –bonintence kaj laŭ la tiamaj sociaj postuloj– alparolis ilin en la germana kvankam sia regomanko. Kiel flanka efekto de tiu praktiko, tragike, la familioj malebligis al ili la rajton korekte lerni la familian lingvon. Tiel, oni ne nur rimarkas la mankon de multlingvema spirito, sed la detrua efekto de lingvaj antaŭjuĝoj kiuj stabliĝis sociskale, kiel neimagebla trudo sur la koncernitaj familioj.

Tiuj antaŭjuĝoj implicas hierarkian klasigon de lingvoj kaj kulturoj kiu konsideras superan tiun de la alvenlando, ekzemple, ĉar ĝi helpus en laborserĉado. En tiu senco, la koncepto kiel oni devus akcepti la novalvenintajn familiojn baziĝis sur la ideo de integriĝo (tio estas, estigi la novalveninton egala al la aliaj, flankenlasante la kulturon kaj lingvon de la alvenintoj) anstataŭ inkludo (tial do, akcepti la novalveninton agnoskante la diferencojn). Bonŝance, temas pri koncepto ĉiam malpli uzata institucie, sed la socia akcepto verŝajne pli malrapidas. Nuntempe la koncepto de inkludo pli kaj pli populariĝas en la edukadsistemo, sed ankoraŭ multas la laboro por ĝia firmigo en la realo. Multlingvismo, tiusence, estiĝas ege utila koncepto por trovi la deirpunkton de inkludiga edukadmodelo: Ĉiuj lingvoj kunhelpas. Ni devas realigi tiun aserton, ne nur en la klasĉambro. Simbole, publike menciante la ekzistantan lingvan diversecon, kaj kvante, inkludante ilin en la valorigo. Sendepende ĉu la L1 (komenca lingvo, devenlingvo, denaska lingvo...) de tiu homo estas giganto aŭ nano en la lingva mondmapo.

Kiel konkludo, oni povas diri ke la lernado de la angla aŭ la franca en la lernejo povas esti unua paŝo por malfermi la mensojn de la lernantaro kaj eduki ilin en multlingvismo, sed endos pluri sur la vojo de edukado en la diverseco kiu konscie agnosku (eĉ valorigeble, se bezone) kaj sciu enkonduki ĝin kiel eble plej nature. En la Hispana ŝtato, ĝis nun ne estas deviga eĉ la lernado de dua fremda lingvo en neniun publika itinero. En Katalunio, la nova instruplano, ankoraŭ prilaborata, antaŭvidas pli intense reliefigi multlingvismon kaj lingvistikan edukadon ĝenerale. Tamen, oni devos kontroli kio estiĝas el tiu teoria emo al agnosko de la realo (en la klasĉambro kaj surstrate). Persone, mi opinias tion socia devo, aparte ĉi tie en Katalunio kie ni tro bone konas, kiom damaĝas la ignorado kaj la subpremo de diverseco. ■

DESPERTAR ASTURIÀ?

Gustavo Sanchi

Professor de llengua i literatura

Milio Rubiera

Ontòleg i lingüista



Enmig de l'esma diària de l'institut, entre llibres de matemàtiques i història, Gustavo i Milio —un parell de marrecs de la Felguera i dels afores de Xixón que acabaren estudiant junts a Xixón ciutat— entropassegaren amb un detall que, encara que gairebé insignificant, resultà d'ésser el catalitzador d'un canvi pregon en la seva percepció del món. En una classe d'història d'Espanya, el professor esmentà de passada les diverses

llengües que coexistien en el país, entre elles una d'*extingida*, l'asturià —o asturleonès. Aquest breu comentari va despertar la curiositat dels joves, que fins aleshores havien viscut immersos en un entorn palesament diglòssic.

Després de classe, els dos amics decidiren d'enraigar una recerca més aprofundida sobre l'asturià. A pleret, desenforinyaren que, malgrat haver

estat una llengua amb una rica història i cultura, patia una greu falta de reconeixement i suport. Això els portà a cavillar sobre la situació d'altres llengües de la península, com el català, el galleg o el basc, que sí que gaudien d'un estatus oficial i d'un suport institucional d'allò més ferm.

Amb el temps, aquesta curiositat es transformà en una fallera i, finalment, en un engatjament. Gustavo i Milio

